


1988 aprilo
81a jaro
n-ro 988 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Havano gastigos
la 75an UK en 1990

Vi trovos,

numeron, kiun celas libroamanto por siaj samideanoj. Estas fakte terure, esti libroamanto kaj deĵori en la Centra Oficejo: Apud la ŝtuparo troviĝas la plej granda Esperanto-vendejo en la mondo, kiun ĉiutage enfluas la tajdo da novaj libroj, stakiĝontaj kiel brunaj ŝaŭmamasoj tra la domo, dum inter la internaciaj ondoj flosas ekzempleroj de la Librokatologo kaj surakve balanciĝadas "Laste aperis..." — kaj laborante por la plu-velado oni neniam havas tempon por legi, nur eble por scivole preni ion, paĝturne trapalpi kaj bedaŭre reĵeti en la maron. Por vi, legantoj-samideanoj, la situacio kompreneble alias: Eble vi neniam vidis Esperanto-librovendejon, eble en via lando eĉ ne ekzistas io tia, kaj por vi tiuj listoj kaj listegoj de haveblaj titoloj restas iel nebulaj, teoriaj, belaj promesoj neniam realiĝontaj, kvazaŭ oni provus klarigi la Pacifikon al mezazia indiĝeno. Por vi, ĉi tiuj paĝoj — kiuj neniel sufiĉos por la veraj libroamantoj, tamen donos ioman akvon al la dezertaj soifantoj.

Domaĝe, ke mi disponas pri nur 20 paĝoj. Ankoraŭ kuŝas en la dosiero "aprilo" duondeko da interesaj artikoloj pri la vivo kaj ekologio de nia libra maro. Kamaradoj-oceanologoj: se aparte interesas vin tiaj aŭ aliaj temoj, nepre indiku tion, eĉ poŝtkarte! Viaj reagoj multe influas la probablecon, ke en posta numero ni denove enbarkiĝos kaj envelos tiun mondon.

Enhavo

- 61 Estrara kunsido: Sub la ombro de bombo (Mark Fettes)
- 62 Landa agado: "Varma tajdo" en Ŝanĝang (Hang Jun); Bharataj spertoj kaj aziaj potencialoj (Yosimi Umeda)
- 64 Junularo: Nova landa sekcio por TEJO; Katalunoj memstariĝis; Entuziasmiga IJK; "Eduki en la spirito de paco"
- 65 La Esperanta libromerkato: Pensoj pri librovendado... (Neil Salvesen); ...kaj eldonado (Mark Fettes); Ne nur *en*, sed ankaŭ *el*! (István Nagy)
- 67 Recenzoj kaj kritikado: Arto, kiu postulas humilon (Marjorie Boulton)
- 69 Recenzoj: *Dictionarium museologicum* (J.C. Wells); *La Libro de Nejma* kaj *La Libro de Adoro* de Geraldo Mattos (Maŭro Nervi); *Vetero kaj klimato de la mondo* de Denis Riley/Lewis Spolton (Elżbieta Nawrocka); *Ĉina antologio (1919-1949)* (Slava Gärtner); *Konsolo de la filozofio* de Boethius/trad. Albert Goodheir (L. Podmele); *Serĉu mian sonĝon* de István Nemere (Laŭrenco Septier); *Amuza legado pri Til' Strigospegul'* de Hermano Boto/trad. Rikardo Ŝulco (Gerrit Berveling)
- 74 Lingvo-uzo: Lingvo centjara, lingvo erara (Bernard Golden)
- 76 Reagoj: Neforgesebla pioniro (Frits Zeiler, J. Cohen-Cedek, Sven Ziegler); Iluzio pri kio? (Detlev Blanke)
- 77 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 78 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
- 80 Oficiala informilo

La kovrilo

Ne Abiĝano, finfine; sed Kubo havas ĉiujn necesajn kvalifikojn por organizi Universalan Kongreson... ĉar tie atendas nin, krom la stereotipaj turismejoj, malstereotipa movado, kiu eventuale povos tiom instrui al ni, kiom ĝi sukcesos lerni.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto: d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto: s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j; telefakso (03) 461-7807.

Ĝenerala Sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano: d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano: prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano: s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano: s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Sub la ombro de bombo


Tiu ĉi plenkunsido de la Estraro de UEA, de la 25a ĝis la 27a de marto en la roterdama domo, estis unika laŭ almenaŭ unu kriterio. Dimanĉon posttagmeze, duono de la kvartalo en kiu situas la UEA-sidejo estis evakuita, pro la elterigo de 500-kilograma bombo el la dua mondmilito. Feliĉe la domo troviĝis ducent metrojn ekster la plej danĝera zono, kaj necesis simple resti interne ĝis la sekursignalo; la nekutima okazaĵo tamen donis ian apartan etoson al la diskutoj. Sed, kiel ŝercis Tonkin en leĝera momento: "Kutime la bombo troviĝas ene de la Centra Oficejo — tio ĉi almenaŭ montras progreson!"

Efektive, problemoj ĉe la profesia flanko de la Asocio okupis nekutime malgrandan parton de la tagordo. La aperigo de la revuo *Esperanto*, Jarlibro, Gvidlibro kaj nova Librokatlogo funkcias glate, kelkaj aliaj verkoj estas ĉe la presisto, kaj ĝenerale oni konstatis harmonian laboretoson en la CO. Ekvakintan postenon de kompostisto-grafikisto, post la foriro de Jan Dukel al nova laboro, transprenos Roy McCoy (Usono) fine de junio. Venis pluraj kandidatiĝoj por la posteno de Konstanta Kongresa Sekretario: el ili, Nikola Rašić (Jugoslavio) faris provviziton al la CO dum semajno en marto, fine de kio definitiviĝis lia enposteniĝo komence de septembro (kondiĉe ke venos la necesaj nederlandaj permesoj).

Ne ŝajnas necese raporti pri la decidoj rilate la venontan Universalan Kongreson en Roterdamo, pri kiu cetere ĵus aperis la Dua Bulteno; vi povos legi pri la plej interesaj evoluoj en venontaj Kongresaj Komunikoj. Apartan mencion tamen meritas la decido, kiu provizis ĉi-foje nian kovrilan logilon: La 75a UK iros al Havano, Kubo, kaj tiel nur la duan fojon al Latina Ameriko. Se sentiĝas bedaŭreto pri la neafrikeco de tiu ĉi UK, ĝin kompensu la kontento ke UEA iras al nova regiono, la Kariba Maro — kaj al juna, vigla landa movado, kiu kapablas tiri plenan profiton de nia ĉeesto.

Kiel en ĉiu marta estrarkunsido, la financoj de la Asocio okupis gravan lokon en la tagordo. Ĉi-foje la estraranoj frontis preskaŭ kontraŭdiran situacion: La Jubilea Jaro finiĝis kontentige, kun nur malgranda negativa saldo malgraŭ la grandskala laboro dum tiu jaro; la buĝeto por 1988, post revizio, iras saman vojon; sed en 1989, pro la manko de antaŭvidebla gajno el la brajtona UK, oni frontas prognozan deficiton de 70 ĝis 100 mil guldenoj. La Estraro proponas al la Komitato kelkajn ŝanĝojn en la buĝeto por atingi la pli malaltan el tiuj sumoj, inkluzive de dekprocenta kotizaltigo; tamen, se oni volas eviti reduktion de la servoj kaj agadoj de la Asocio, oni nepre devas serĉi novajn fontojn de enspezoj. Evidenta tia fonto estus la kreskigo de la individua membraro de UEA, kiu — je iom pli ol 7 000 — certe ne realigis sian potencialon, iam taksita de Ivo Lapenna je 15 000 movadanoj. Konstatante, ke tia celo estus atingebla nur kun la plena subteno de la Komitato de UEA, la Estraro dissendas al ĝi la deficitan buĝeton kaj atendas konkretajn sugestojn por pligrandigo de la enspezoj.

Alia granda parto de la kunsido estis dediĉita al raportoj kaj diskutoj pri la evoluo de du novaj "centroj" de la Movado: la Bjalistoka Centro Zamenhof kaj la Azia Centro de UEA. En la kazo de Bjalistoko la Movado frontas nekutiman situacion, ĉar nemovadaj instancoj volas pli rapide agi ol la esperantistoj mem! Bjalistoko, kiel la ĉefa urbo en ekonomie malbonfarta regiono de Pollando, sukcesas tiri al si nekutime multe da atento kaj subvencioj en la nuna momento, kaj samtempe tre deziras pligrandigi sian allogon internacie. Pro tio, estas jam tute certe ke oni konstruos la Centron Zamenhof (per pola kapitalo); sed la bjalistokanoj nepre volas kunlabori kun la tutmonda movado, por ke oni uzu internacie la Centron post ĝia



(dekjara) konstruo. Tiucele jam formiĝis internacia gvida komitato, en kiu reprezentigas bjalistokaj instancoj, polaj esperantistoj kaj UEA, TEJO, ILEI kaj CED, sub la prezido de la iniciatinto, prezidanto de la pola parlamento Roman Malinowski. La komitato faros decidojn pri la celoj de la Centro kaj kontrolos la konstruadon. En ĝia unua kunsido, en februaro, principe akceptiĝis la propono de UEA-prezidanto Tonkin pri la formo de la Centro, kiun li ellaboris surbaze de proponoj faritaj de diversaj movadanoj post la varsovia UK. Ĝi antaŭvidas multifunkcian strukturon, samtempe renkontejo-kursejo kaj instituto por la studado de internacia komunikado kaj pola lingvo-kaj kultur-politiko. En junio okazos la dua kunsido de la gvidkomitato, ĉe kiu Tonkin kaj ĝenerala direktoro Simo Milojević reprezentas UEA.

Estrarano Yosimi Umeda raportis pri siaj laboroj por la starigo de Azia Centro, surbaze de la grandioza donaco de 3 milionoj da enoj kiun UEA ricevis por antaŭenigi la azian agadon. (Vd. ankaŭ la artikolon kiu komenciĝas sur paĝo 63.) Ĉiuj movadoj en la regiono konsentas, ke Ĉinio estas la plej taŭga loko por eventuala Centro; Umeda tial esploris pri gastamaj ĉinaj urboj kaj venis al provizora

interkonsento kun ĈEL pri kontrakto por ĝia funkciigo. La Estraro tamen ne volas tro rapidi en la elspezo de mono por konstruaĵo. Rezulte, ĝi proponis al ĈEL trijaran provperiodon, por kiu ĈEL ellaboru programon de azia agado kun buĝeto de ĝis unu miliono da enoj jare. (Tion kovrus la rento el la Azia Kapitalo, kiu ekde nun eniros novan Fondaĵon Azio: La ĝisnuna Fondaĵo Azio-Afriko fariĝis simple Fondaĵo Afriko.) Samtempe, ĈEL estas invitita prezenti pli longedaŭran programon por la posta periodo, kiu povus antaŭvidi elspezon ankaŭ de la kapitalo, por konstruaĵo aŭ aliaj nmoveblaĵoj. Oni esperas povi ekfunkciigi la provperiodan agadon jam ĉe la roterdama Universala Kongreso.

Pli zorgiga estas la stato de Terminologia Esperanto-Centro, kiu perdis la laboron de sia part-tempa sekretario I. Bujdoso kaj tial malfacile eklaboras. Ankaŭ Institucio Hodler funkcias malkontentige: ĝia ŝuldo al UEA ankoraŭ superas 100 000 guldenojn, kaj se tio ne reduktiĝos je duono ĝis la jarfino oni konsideros la eble-

Multaj aliĝoj al IAKSTE-2

Ĝis la fino de 1987, jam anoncis sin por la 2a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (okazonta en Pekino en aŭgusto) pli ol 40 eksterlandaj kaj pli ol 200 ĉinaj fakuloj. Inter la partoprenantoj reprezentigas vasta gamo da temoj: de matematiko kaj fiziko tra geologio, biologio kaj medicino ĝis ekologio kaj ekonomiko. La prelegoj tuŝas plurajn monde aktualajn problemojn: la imun-deficitan malsanon, la prognozon de naturaj katastrofoj, utiligon de tervarmo kiel energio-fonto k.a. La rolo de Esperanto en la moderna mondo ankaŭ ricevos atenton, ekzemple la aplikado de la lingvo al permaŝina tradukado.

Por la lastaj informoj aŭ malfrua aliĝo skribu al: Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

con transpreni la domon, kiun ĝi posedas en Roterdamo. Plian zorgon donis la provizora decido de la eldonisto de la CED-revuo *Language Problems and Language Planning* nuligi la ekzistantan kontrakton. Cele al financa plifortigo de la revuo, unu el la ĉefaj en la kampo de lingvoplanado kaj grava forumo por la ekstermovada pristudo de Esperanto, la Estraro decidis altigi la abonprezojn kaj subvencii varb- kaj abonig-kampanjojn prizorgotajn de la presejo, kies decido ja ne estas ankoraŭ definitiva.

La estraranoj redistribuis inter si la taskojn laŭ la tradicia sistemo, konstatante, ke la nova sistemo adoptita en Pekino (pri apartaj sferoj de interna kaj ekstera agado) neniam kontentige funkciis. Masterman plu respondecas pri financaj aferoj, kaj la Oficejo povas krome disponi pri la servoj de du nomumitaj Konsilantoj, E. Woessink kaj K. Ruig, en kazo de bezono. La Estraro krome akceptis la ideon, ke la du direktoroj, kun la helpo kaj konsiloj de aliaj oficistoj kaj aktivuloj, konsistigu ian "plenumkomisionon" kun la celo liberigi la estraranojn de la traktado de detaloj kaj doni al la Oficejo pli klaran voĉon en la administrado de la Asocio.

Mark Fettes

LANDA AGADO

“Varma tajdo” en Ŝenjang

Ŝenjang (Shenyang) estas la ĉefurbo de la provinco Liaoning en nord-orienta Ĉinio. De aprilo ĝis oktobro de la pasinta jaro, kunlabore kun la urba televida stacio, Ŝenjang-a Esperanto-Asocio funkciigis la unuan televidan Esperanto-kurson. Pli ol 6 000 personoj anoncis sin por la kurso. Inter ili estas profesoroj, instruistoj, studentoj, scienc-teknikaj laborantoj, instituciaj oficistoj, medicinaj laborantoj, ordinara laboristoj kaj kamparanoj, mez- kaj elementlernejoj. La plej aĝa estas pli ol 70-jara kaj la plej juna dekelk-jara. La kurso okazis ĉiujespere po 45 minutoj. Post sesmonata lernado, pli ol 2 100 kursanoj sukcese trapasis la finan ekzamenon kaj ricevis la diplomon.

La diplomadan ceremonion, kiu okazis la 13an de januaro, partoprenis ĉirkaŭ mil reprezentantoj de la kursanoj. Ĉeestis ankaŭ gvidantoj de la urbo kaj la provinco, kaj speciale venis de Pekino s-ro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, reprezentantoj de *El popola Ĉinio* kaj de la Esperanto-sekcio de Radio Pekino, plus raportistoj de la fama Ĉina Novaĵ-Agentejo kaj la ĵurnalo *China Daily*.

La urba Esperanto-asocio en Ŝenjang fondiĝis en julio, 1985. Ĝi celas per Esperanto akceli la scienc-teknikan kaj kulturan interfluron kun aliaj landoj, pliigi reciproke kompreniĝon kaj amikecon kun diverslandaj popoloj kaj antaŭenpuŝi la reformadon kaj malfermon de la urbo. Post sia fondiĝo, la asocio funkciigis dekojn da diversgradaj Esperanto-kursoj kaj disvastigis Esperanton inter miloj kaj miloj da popolanoj. Nun en la urbo troviĝas ĉirkaŭ 30 000 esperantistoj, el kiuj pli ol 2 600 estas membroj de la asocio. En dek altlernejoj de la urbo, nemalmultaj studentoj lernas Esperanton kiel nedevigan studobjekton. Ankaŭ en iuj elementaj lernejoj kaj infanĝardenoj oni instruas Esperanton al la infanoj.

Por altigi la lingvan nivelon kaj parolkapablon de siaj membroj, la asocio organizas ĉiusomere esperantistan tendumon. Por la Zamenhof-festo ĝi aranĝas diverstemajn prelegojn. Ĝi malfermis Esperanto-angulon en parkoj kaj loĝkvartaloj, kie esperantistoj aktive sin ekzercas en konversaciado.

La asocio havas rilatojn kun pli ol 90 enlandaj Esperanto-asocioj. Krome ĝi koresponde rilatas kun societoj aŭ grupoj en Japanio, Usono, Svedio, Aŭstralio, Pollando, Francio kaj aliaj landoj. Estante sub la rekta gvidado de la urba turisma servo, ĝi povas rekte kontakti kun alilandaj turismaj servoj kaj memstare inviti alilandajn turistojn. Ĝi jam akceptis kelkdek esperantistojn el diversaj landoj.

Kiel la Esperanto-movado en Ŝenjang povas tiel rapide disvolviĝi? Oni ŝuldas tion al la forta subteno kaj fervora helpo de la gvidantoj de la urba registaro. Laŭ vicurbestro s-ro Zhang Rongmao, kiun mi intervjuis ĉe la diplomada ceremonio, la urbo celas “iri al la tuta mondo... Ĝuste pro tio ni kuraĝigas niajn kamaradojn lerni fremdajn lingvojn. Esperanto estas lingvo kun monda karaktero. Ĝi havas grandan potencialan forton. En iu tempo eble ĝi fariĝos monda lingvo, pli ofte kaj vaste uzata de ni ĉiuj. Ĝuste kun

tiu kompreno ni aktive kuraĝigas nian koncernan fakon... doni al ĝi nian subtenon kaj helpon.”

Similan komprenon pri Esperanto havas ĉiuj ĉinaj esperantistoj kaj tiuj, kiuj aprobas Esperanton. Per Esperanto por la reformado kaj malfermado de Ĉinio, tio estas la nova movforto por la Esperanto-movado ne nur en Ŝenjang, sed ankaŭ en la tuta Ĉinio.

Hang Jun (raportisto ĉe Radio Pekino)

Bharataj spertoj kaj aziaj potencialoj

En decembro, laŭ invito de Federacio Esperanto de Bharato (FEB), mi partoprenis la 4an Tut-Bharatan kaj Jubilean Kongreson de Esperanto en Kalkato. Kiel la estrarano de UEA respondeca por la aziaj agadoj, mi vizitis en la Jubilea Jaro jam Aŭstralion, Korean Respublikon kaj Ĉinion (dufoje), por pli bone konatiĝi kun la tieaj aktivecoj kaj interkonsiliĝi kun la movadaj gvidantoj pri novaj strategioj de UEA. Ankaŭ la vizito al Bharato estis ligita al tiu celo.

Bharato estas multlingva landego, kiel oni povas konstati i.a. per la 14-lingvaj monbiletoj. Oni facile kalkulas centojn da etnaj lingvoj tra la lando. Sub la regado de la Brita Imperio, la angla lingvo fariĝis deviga komunlingvo dum longa tempo, kaj ankoraŭ ĉe granda plimulto de la bharatanoj ĝi sufiĉas kiel interlingvo por ĉiutagaj bezonoj. Sub tiaj cirkonstancoj, la aktivuloj de la Esperanto-movado en Bharato konsistas el tiuj, kiuj pli-malpli pridubas kaj protestas tiun anglalingvan imperiismon.

FEB estas la federa tegmento por diversaj zonaj grupiĝoj tra la ŝtatoj, kun entute ĉ. 500 membroj. La

sekretariejo de FEB troviĝas en Kalkato (ĉefurbo de la ŝtato Okcidenta Bengalio), aŭ pli precize, tie loĝas s-ro S.S. Pal, la ĝenerala sekretario, kies ataŝea valizo, pro manko de financaj rimedoj flanke de FEB, fakte konsistigas la moviĝantan sekretariejon. La unua FEB-kongreso okazis en 1982, kaj tiun ĉi kvaran kongreson ĉeestis ĉ. 120 personoj el diversaj zonaj grupoj, plej multe el Kalkato. Ĝoje mi konstatis, ke granda parto de la partoprenantoj aspektas juna, kaj inoj konsistigas eble trionon.

La unua tago de la kongreso estis malferma al la ĝenerala publiko, kun diverstemaj prelegoj de okulisto, dramisto, juristo kaj universitataj profesoroj, ĉiuj famaj en siaj fakoj, en la bengala kaj la angla krom iomete en Esperanto. Ankaŭ mi prelegis en la angla pri la atingoj de Esperanto en cent jaroj. La dua tago estis por la esperantistoj: ĝenerala kunsido de FEB (en kiu Probal Daŝgupto estis elektita la nova prezidanto), kulturaj kaj distraj programeroj k.s.

La lingva nivelo de bharataj esperantistoj estas sufiĉe alta, kaj tial mi tre deziras ke pli multaj esperantistoj el aliaj partoj de la mondo vizitu Bharaton ol ĝis nun, por alporti al ili oftan okazon praktike uzi la lingvon. Por ili estas ankoraŭ malfacile vojaĝi eksterlanden, kaj ili do atendas la viziton de alilandaj samlingvanoj.

En mia vojaĝado tra Azio mi cetere rimarkis la varion en la cirkonstancoj de la landaj movadoj. En Ĉinio, la ŝtataj instancoj subtenas la rolon de Esperanto kaj oficiale rekomendas ĝian instruon en altlernejoj. Sekve, la nombro de la lernantoj grandioze multiĝis en la lastaj kelkaj jaroj, ankaŭ motive de la 71a UK en Pekino. La korea Esperanto-movado respegulas la ekonomian progreson de Korea Respubliko, penetrante inter la junajn, pli internaciismajn generaciojn. La japana movado, aliflanke, estas bazita sur libervola aktivado en kultura-socia-intelekta

La nova estraro de FEB en la dua kongresa tago.



agadkampo, laŭ labormanieroj tute sendependaj de ŝtata subteno.

En la sudorientaj aziaj landoj kaj la hinda subkontinento ekster Bharato, ni trovas delegitojn de UEA kaj manplenojn da entuziasmo, kiuj portas la torĉon de la esperantismo sed ne sukcesas pli konkretigi la utilon de la lingvo. Escepto estas Vjetnamio, kiu havas propran organizaĵon kaj iom da ĉeldona agado, sed ankoraŭ ne povas libere partopreni en la internacia movado krom tra Mondpaca Esperantista Movado kaj similaj aranĝoj. En okcidenta Azio, ni jam scias pri la granda interesiĝo en Irano, kie daŭre aktivas fervoraj geamikoj.

Kio gravas por plivigligo de la Movado en tiuj ĉi partoj de la mondo? Mi aŭdis konstante dum miaj vizitoj, ke oni bezonas freŝajn kaj utilajn informojn kaj dokumentojn pri sciencaj kaj teknologiaj eltrovaĵoj kaj progresoj, kaj ke Esperanto helpu al ili en la plialtigo de la ĉiutaga vivnivelo. Starigo kaj firmigo de paco kaj amikeco inter la popoloj de la mondo surbaze de pli bona kaj trafa interkompreniĝado estas la plej nobla ideo de la esperantismo, sed Esperanto ja devas ludi la rolon de ĉiuj homaj lingvoj, nome funkcii kiel komunikilo de pensoj kaj informoj por diversaj homoj kaj celoj.

Yosimi Umeda (Japanio)



La aŭtoro dum vizito kun japana grupo al Ĉinio: Ĉu la Azia Centro povus kuraĝigi tiajn kontaktojn?

JUNULARO

Nova landa sekcio por TEJO

La Komitato de TEJO en januara perpoŝta voĉdono akceptis unuanime la aliĝpeton de la Esperanta Junulara Dana Organizo, kaj bonvenigis ĝin kiel la 27an Landan Sekcion. En la sama voĉdono la Komitato decidis renovigi la jam tradician kontrakton kun PSEK (Pola Studenta Esperanto-Komitato) kaj partopreni la 13an Mondan Festivalon de la Junularo kaj Studentaro en Pionjan, Norda Koreio. Adoptiĝis ankaŭ rezolucio koncerne MG-kotizojn sub la supozo, ke UEA-membroj kun Gvidlibro ricevas la servojn de TEJO, sed fakte tio ne okazas nun kaj verŝajne ne povos okazi en tiu malalttarifa kategorio.

Katalunoj memstariĝis

Sekve de la laŭstatuta malakcepto de Kataluna Esperanto-Junularo kiel TEJO-sekcio (*Esperanto* 1987/p.181), KEJ malfondis sin en novembro 1987 kaj restariĝis kiel Junulara Esperantista Kataluna Asocio (JEKA). Per reformiĝo kiel memstara organizaĵo, la junaj katalunoj evitis la juran stumblilon en la TEJO-statuto kaj tre verŝajne akceptiĝos kiel la 28a Landa Sekcio ĉe la IJK en Zagrebo. Tio sendube donos diplomatiajn zorgojn al la hispana registaro, kiu preferas eviti apartan traktadon por Katalunio. Hispana Esperantista Junulara Societo, la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, tenas sin neŭtrala pri la demando.

Entuziasmiga IJK

La zagreba LKK ĉiel klopodas realigi, en la mez-eŭropa 44a Internacia Junulara Kongreso, la plej bonan eblan ekvilibron inter la partoprenantoj el ambaŭ flankoj de Eŭropo kaj aliaj mondopartoj. Oni aparte traktis kun pola, bulgara, hungara kaj ĉeĥa asocioj pri transpagaj

problemoj, prepariĝas karavano de japanaj junuloj kaj okazas diskutoj pri la plej konvenaj rimedoj venigi junulojn el Afriko, Sudameriko kaj aliloke.

Krom tre riĉa kultura kaj amuza programo, kiu antaŭvidas i.a. po du teatraĵoj preskaŭ ĉiutage, eĉ la manĝoj estos parto de la programo: per la landa kuirarto oni konatiĝos kun la lando mem. Aparte gravas la kongresa temo (komunikado en la 21a jarcento): LKK denove invitas ĉiujn kongresanojn partopreni en ĝia realigo, per sugestoj aŭ kunlaboro. Oni povos kontribui al ellaborado de la kongresa gazeto, radio-programoj, interna televido kaj video-programoj, kaj tiel lerni ion pri tiuj facetoj de komunikado. La kongreson aŭspicias pluraj firmaoj, inter ili BSO (kiu prezentos sian DLT-projekton) kaj verŝajne la jugoslaviaj agentejoj de la gigantoj IBM kaj Apple, plus pluraj aliaj. Ĉiutage vi povos vidi, aŭdi kaj legi en Esperanto novaĵojn el la tuta mondo, la kongreslando kaj -urbo kaj kompreneble la kongreso mem.

Ankaŭ aliaj programoj estos sufiĉe variaj kaj interesaj. Anoncu viajn preferojn ĉe LKK de la 44a IJK, Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

“Eduki en la spirito de paco”

De la 13a ĝis la 15a de majo okazos en Toruń, Pollando, seminario de Pola Studenta Esperanto-Komitato. La temo, laŭ UN-deklaro de 1978, estos “Kiel eduki la sociojn en la spirito de paco”: PSEK celas per la seminario kontribui al la plifirmigo de rilatoj inter la Esperanto- kaj pacmovadoj. Laborlingvoj estos Esperanto kaj la pola, kaj jam konfirmis sian partoprenon profesoroj pri juro kaj politiko, membroj de la Pola Akademio de Sciencoj, la sekretario de la Pola Packomitato kaj aliaj prelegontoj. Por detaloj, kontaktu PSEK antaŭ la fino de aprilo ĉe ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

Pasis jaro kaj duono de post la lasta numero, en kiu ni donis apartan emfazon al la Esperanta librokulturo. Tie temis pri la originala literaturo; sed tio kompreneble tuŝas nur onon de la tuta produktado en Esperanto, kiu nun ampleksas pli ol 250 librojn jare. Ĉi-numere ni malfermas niajn paĝojn al aliaj temoj, kaj aparte al la malfacila arto prezenti kaj vendi librojn al legantaro dissemiita tra la mondo. La artikolon de Marjorie Boulton ilustras pluraj recenzoj, kiujn vi eble ŝatus pritaksi laŭ ŝiaj kriterioj. . . kaj se iu(j) el ili aparte plaĉas aŭ malplaĉas, notu tion sur poŝtkarton kaj sendu al ni. Pli da komunikado inter verkistoj, eldonistoj kaj legantoj jam en si mem signifus pli sanan merkaton!

Pensoj pri librovendado...

Por legantoj, kiuj venas freŝaj al nia aprila furor-listo, ni ripetu la ĉefan kriterion: La vicordo formiĝas laŭ la nombro de libroj, kiujn nia libroservo vendis **en unuopaj ekzempleroj dum 1987**. Ne registriĝas kasedoj, diskoj, filatelaĵoj, kvankam tiu lasta fako signife vastiĝis pasintjare. Same ne enkalkuliĝas rabatvendoj, kaj kie temas pri monde populara verko, povas esti ke unuopaj vendoj ĉe ni sumas je nur dekono de la tuta debito. Tiajn verkojn ni kaj aliaj eldonistoj vendas precipe pogrande je rabato al aliaj libroservoj, kiuj volonte riskas sian kapitalon en tiaj kazoj. Kiam temas pri libro kun pli modesta debito, la

(por tri nacilingvaj vortaroj). La meza prezo estas iom pli ol 32 gld. Vortaroj kaj prilingvaj libroj kaj legolibroj konsistigas pli ol la duonon. El la pasintjara listo restas nur 7 titoloj, sed la “novaj” nomoj ne estas tute novaj: inter la reaperantoj estas ekzemple *Plena vortaro*, dum PIV kaj la nederlanda vortaro aperis en novaj eldonoj. Aperdatoj ankaŭ influas (eblas jam nun prognozi promocion al la nova PIV kun Suplemento kaj al la *Studoj* sub redakto de Duc Goninaz (n-ro 19), kiuj haveblis nur aŭtune), kaj oni ne devus konsideri tre signifa la sinsekvon en la subaj lokoj, kiu facile ŝanĝiĝus per malgranda plia mendo.

Mankas en la listo ankaŭ la tuta kongresa rezulto. Tie en Varsovio estis ankaŭ sufiĉe da rabato al la prezoj, kaj la kongresanoj amase profitis la libroservon. (Ja vidi la libron antaŭ ol aĉeti estas iom malofta ebleco por multaj esperantistoj!) Ĉar aĉeto dum vizito al la CO, kvankam bonvena, estas statistike malmultsignifa, perpoŝtaj vendoj estas la normalaj kaj praktike la solaj en la supra listo.

La nuna diskuto pri la estonta agado de UEA permesu al ni iom da pensbalonoj. La libroservo estas kerna; nur trans niaj kadavroj, por tiel diri, oni forigus ĝin, aŭ duonigus, aŭ arbitre limigus ĝian klientaron. Sed ĝi ludas specife movadan rolon de rezerva stokejo por estontaj esperantistoj, preskaŭ kiel biblioteko, ĉar ĝi konservas 3000 titolojn, el kiuj nur dekono estas iel aktivaj. Signifa kvanto registras nur unu, se entute unu, vendon dum la jaro. Ne temas pri granda kapitalo; aliflanke, inter tiuj senmovaj titoloj, kelkaj valoraj restas kvazaŭ kaŝitaj. En la katalogo, kiun ricevas novaj membroj, oni malfacile orientiĝas malgraŭ niaj priskriboj. Almenaŭ dum la ĉi-jara kongreso ni proponos pli da titoloj, sed restas tiel, ke ni estas ĉefe perpoŝta vendisto kaj tiu trijara katalogo, eĉ kun detala monata suplemento (“Laste aperis”) en ĉi tiu revuo, ne sufiĉe servas.

Ni havas proprajn ideojn pri iuj eblaj solvoj. Se ankaŭ vi, libroservaj klientoj, volas debati, bonvolu; la temo estas grava ankaŭ el financa vidpunkto. Cetere, la listo de furoraĵoj por 1988 eble havos malsaman fizionomion — sed pri ĉiuj novaĵoj ne jam estas tempo anonci.

Neil Salvesen (direktoro de la CO)

...kaj eldonado

Eĉ se ni havus perfektan libroservon, vaste uzatan de niaj klientoj kaj kun modelaj rilatoj kun aliaj eldonejoj, tio ne nepre signifus plenan saniĝon de la libromerkato. Ne temas nur pri tio, ke valoraj libroj ŝimas sur la bretoj, sed ankaŭ pri tio, ke aliaj, legindaj kaj foje legendaj, malaperis el la merkato kaj neniam reeldoniĝis; aŭ ja reeldoniĝis, sed je fantazia prezo; aŭ kuŝas ie en manuskripto, survoje al entombiĝo kun sia verkinto; aŭ eventuale neniam efektiviĝis, ĉar mankis ajna certeco pri posta eldono kaj enmerkato.

Ekzemploj en ĉiu kategorio ne estas malfacile troveblaj. *La granda kaldrono* de John Francis, unu el la plej bonaj Esperanto-romanoj, eldonita nur en 1977, ne plu haveblas. *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwarz, alia pinta romano, reaperis — finfine — en 1987 (ĉe Artur E.

LA PLEJ VENDITAJ LIBROJ DE LA UEA-LIBROSERVO EN 1987

1.	Vetero kaj klimato (Riley k Spolton/trad. Long)	28,50
2.	Plena analiza gram. (Kalocsay/Waringhien)	48,00
3.	Faktoj kaj fantazioj (Boulton)	36,00
4.	Nederlands-Esperanto-Nederlands (Middelkoop)	23,40
5.	Serĉu mian sonĝon (Nemere)	18,00
6.	Esperanto and English Dictionary (Wells)	23,70
7.	Amo kaj morto en Balio (Baum/trad. Mooij)	28,50
8.	Saluton! (Childs-Mee)	24,00
9.	Plena ilustrita vortaro (Waringhien)	138,00
10.	Plena vortaro (Grosjean-Maupin k.a.)	30,00
11.	Diskriminacio (div. aŭtoroj)	21,00
12.	Baza legolibro por komencantoj (red. Benczik)	13,80
13.	Esperanto — Textbook of the I.L. (IKS)	6,60
14.	Esperanta antologio (red. Auld)	60,00
15.	Post la iel-tiela kompletiĝo (Ludovikito)	37,50
16.	Praktika bildvortaro (Language services)	14,40
17.	Perkomputila tekstoprilaboro (red. Koutny)	30,00
18.	Ĉina antologio 1919-1949	21,00
19.	Studoj pri la Internacia Lingvo (div. aŭtoroj)	39,00
20.	Hura! (Baghy)	36,00

klientoj pli verŝajne aĉetos unuope de ni, kiuj celas stoki ĉiun haveblan titolon.

En la nuna listo, naŭ el la libroj estas eldonitaj aŭ komplete aŭ sub la prizorgo de UEA. Eldonintoj de la aliaj estas Hungara Esperanto-Asocio (3), SAT (2), kaj po unu el Jugoslavio, Ĉinio kaj Japanio, plus tri nemovadaj ŝildoj

Itis), sed je prezo (62,10 gld.) kiu preskaŭ nuligas la valoron de la reeldono. Se forlasi fikciajn verkojn, jam de jaroj ekzistas manuskriptoj por Esperanto-araba kaj granda Esperanto-angla vortaroj, dum ekzemple *Sisteme ordigita vortaro* (vd. *Esperanto* 1987/p.94) eldonigis nur kiel kunflikita mimeo, sufiĉe malfacile uzebla. Kaj jam delonge oni sentas la bezonon de konciza Esperanta gramatiko, pli praktika kaj malpli katedra ol PAG.

Jen nur kelkaj ekzemploj. Por resumi, ni diru ke mankas al la Esperanta komunumo iu superrigarda forumo, kiu povus konstati mankojn kaj kunordigi laborojn por plenigi ilin. Eventuale tio eĥas iujn proponojn de Detlev Blanke en *Esperanto* 1987/p.209-10. . . Lia solvo estis "Internacia Konsilantaro", pri kiu daŭras ia debato en niaj paĝoj (p. kaj); sed ni konsideru, ĉu ne eblas jam atingi sufiĉe multe per pli konsekvenca eldona politiko de UEA?

Malmultaj neus, ke eldonado estas taŭga okupo por la Asocio: ĝi rekte kontribuas al la plifortigo de la Esperanta kulturo, kaj cetere alportas iom da enspezoj, kvankam ankoraŭ malgrandkvante. Opinioj ekdiversas, tamen, je la demando pri eldonindaĵoj. Vi povis jam legi la opinion de, ekzemple, Géza Felső en la pasinta numero, kie li argumentis por la prioritato de sciencaj lernolibroj k.a. fakverkoj. Malgraŭ la forpaso de la Scienca Eldona Centro,

UEA verŝajne devos reveni al tiu demando post nelonge; sed ĝi tamen rilatas al nur unu ĝenro el pluraj, kiuj meritas subtenon. Tre fortan argumenton oni povus fari por la malmultekosta eldonado de klasikaj verkoj, por fortigi la komunan kulturan bazon de la Movado. Same prave oni pledus por la mendado (kun eldona certigo) de novaj referenciloj: poŝaj gramatiko kaj vortaro, ĝisdatigitaj versioj de la diversaj partoj de *Esperanto en perspektivo*, nova Enciklopedio (kiu ja estas pli ol unuhoma laboro) ktp. Kaj tio certe ne elĉerpas la puton. . .

Ĉu estas fantazio pensi pri solvo de tiuj problemoj? Laŭ mi, ne nepre. Sed fari tion profesie ni ankoraŭ ne kapablas. Estus tute iluzie atendi, ke ekzemple unu salajrata oficisto de UEA (la posteno de eldonredaktoro jam ŝvebis de kelkaj jaroj en la CO) povus mem realigi multon el tiuj proponoj; sed aliflanke, se li aŭ ŝi okupiĝus parte pri la funkciigo de plurnacia volontula grupo de kompetentuloj, oni profitus de ambaŭ flankoj de duon-profesia organizaĵo. Oni ne konceptu UEA kiel ian monopoleman entreprenon, sed kiel socian help-instancon; ni povas evoluigi ĝin laŭ niaj bezonoj, uzi ĝin same kiel ni uzas la lingvon mem, por komuniki kaj kunlabori. Eldonado, unu el la fundamentoj de nia komunumo, estus taŭga kampo por rekomenci la kultivon.

Mark Fettes (redaktoro de *Esperanto*)

Ne nur *en*, sed ankaŭ *e!*

La nemovadaj eldonistoj nevolonte aperigas verkojn tradukitajn el Esperanto. "Esperanto-literaturo, kiu aŭdis pri ĝi?" ili tuj demandas sin; "Mi vivas el profito — eldonu ĝin la esperantistoj!" Kaj miascie, ankaŭ la Esperantaj eldonejoj tre malofte eldonas tradukojn el Esperanto. Ĉu ankaŭ ili timas?

Mi pensas, ke la esperantistoj ĉiam kaj senĉese atendas la aperon de la "granda ĉefverko" originale verkita en Esperanto. Jes, tiam — laŭ ili —, tiam la tuta mondo tradukos ĝin en multajn lingvojn kaj nia literaturo estos parto de la mondliteraturo. Eble iam naskiĝos tiu ĉefverko, sed ĝis tiam. . . kion fari? Ofte ni diras, ke Esperanto estas pontlingvo. Domaĝe, ke la esperantistoj malofte uzas ĉi tiun ponton.

Nemalmultaj libroj tradukitaj el Esperanto bone vendiĝis. Hungaraj tradukoj de *Kredu min sinjorino!* de C. Rossetti kaj *Maŝinmondo* de Szathmári estis rapide aĉetitaj. *Kumeŭaŭa* de Sekelj aperis en dek ses lingvoj. Neniu el tiuj verkoj apartenas al la mondliteraturo, tamen oni aĉetis ilin. Kaj se la libroeldonisto riskas sian profiton per tia eldono, la aperigo de noveloj kaj rakontoj en semajna aŭ monata nacilingva revuo prezentas nenian monan riskon, ĉar la revuo ĉiukaze aperas en sciata tago kaj en sciata nombro de ekzempleroj. Oni ne forgesu, ke la revuojn dek- aŭ centmiloj certege legas.

Kion fari? Oni povas agadi individue, se oni havas bonan kontakton kun la redakcio de revuo kaj kapablon por la tradukado, aŭ kunlabore kun nacilingva verkisto kiu polurus laŭnecese la krudan tradukon. Grupo de literaturistoj povas formi "tradukan rondon", en kiu troviĝas ankaŭ verkistoj simpatiantaj kun Esperanto. La rondo

Nova Suplemento de PIV jam ne plu havebla!

La Libroservo de UEA bedaŭrinde ne plu disponas pri ekzempleroj de la nova Suplemento al *Plena ilustrita vortaro*. Laŭ la eldonisto, Sennacieca Asocio Tutmonda, la stoko elĉerpiĝis. Bonvolu noti tion kaj provizore ne plu mendi la Suplementon ĉe ni. Dankon!

okupiĝu precipe pri la tradukado por revuoj, gazetoj, per kiuj ni povas atingi multe pli da legantoj. Libroj kompreneble pli gravas, sed nur se oni povas trovi aĉetantojn.

En decembro 1987 aperis en Hungario dulingva libro (304p.) ĉe la prestiĝa Eldonejo Europa, titolita *Mia vojo en la mondo* (hungare) kaj *Mi vizitis mian farmon* (Esperante). Ĝi enhavas novelojn kaj poemjn de konataj Esperantaj verkistoj, sub la redakto de Mihály Gergely, iama ĉefredaktoro de *Hungara vivo*. Imitinda ekzemplo.

Mi komprenas, ke oni stimulas la evoluon de la originala Esperanta literaturo, sed tio estas nur la unua paŝo. La dua paŝo estu la traduko de la originalaj verkoj. Ĉu la tradukistoj de *Kumeŭaŭa* ne faris tiel gravan aŭ pli gravan kaj laŭdindan laboron por Esperanto ol poeto per dekversa poemo (eĉ majstra) aŭ novelisto per dupaĝa historieto? En si mem estas tre grava fakto, ke la Esperanta literaturo estas tutmonda ĉar ĝi estas legata tutmonde; tamen, por uzi la kliŝajn vortojn: "Ni devas trarompi la verdajn literaturajn murojn." Ke tio eblas, tion pravas la rezultoj jam atingitaj ĉi-terene.

István Nagy (Hungario)

Arto, kiu postulas humilon

Mi preferus neniam recenzi. Mi malofte rifuzas tiun taskon, ĉar kompetentuloj ankoraŭ ne svarmas. Sed mi ĉiam sentas, ke juĝodevo estas morale danĝera devo, ĉar ĉia firma juĝo enhavas ian eron da aroganteco: kiu el ni, ĉiuj tiel fuŝkapablaj, eraremaj kaj difektoplenaj, rajtas vere juĝi aliajn? Ia humileco antaŭ la komplikeco de la vivo estas esenca devo de vera civilizito; tamen, serioza recenzisto devas portempe iom flankenmeti parton de humileco kaj publike esprimi ian taksadon.

Sed, se ni devas provizore flankenmeti humilecon, ni anstataŭigu ĝin, ne per antaŭjuĝoj aŭ egoisma singravigo, sed per konscienca elpensema ver-celado, ver-amo kaj ver-diremo.

Recenzisto devas konsideri unue la publikon, kiu deziras sciiĝi, kiuj novaj libroj estas aĉetindaj, kaj kio, pli ĝenerale, okazas en nia literaturo. (Mi neniam aĉetus libron pri matematiko, sporto aŭ vestada modo; sed tre eble volus informi iun alian, ke tia libro ĵus aperis.) Recenzisto ĉiam memoru, ke la granda plimulto, kiuj legos la recenzon, ankoraŭ ne legis la libron; recenzisto do donu la minimumajn gvidajn informojn:

1. **La esencajn bibliografiajn faktojn:** titolon de la libro, nomon de aŭtoro, eldonejon, daton, nombron da paĝoj, prezon, ĉu la libro estas bindita aŭ broŝurita, ĉu

estas bildoj, mapoj, grafikaĵoj, grava enkonduko aŭ grava glosaro; oni ankaŭ menci, se estas nova eldono de jam eldonita libro, kolekto de jam aperintaj artikoloj, ktp.

2. **Informojn pri la enhavo:** kompreneble, pri kio temas: romano pri geamantoj, kiujn milito disigas; scienca studaĵo pri likenoj; antologio de tradukitaj kantoj; sed ankaŭ pri la skalo de la verko, la metodo pritrakti la temon. Ĉu medicina verko celas nur kuracistojn, aŭ ankaŭ nefakulojn? Ĉu romano estas nur distra legaĵo aŭ serioz-intenca grava artverko? Ĉu verko pri politiko estas nur ankoraŭ alia oscediga unuflanka propagandilo, aŭ vere celas ian klarigan analizon? Ĉu lernolibro aŭ legolibro taŭgas por lernejo, vesperaj kursoj, aŭtodidakto?

En Esperantio ni havas demandon, kiun oni kutime ne mencias pri nacilingvaj verkoj: pedagogian demandon. Ĉar alta procento de legantoj estas komencantoj aŭ postkomencantoj (kaj estas grave, ke ili progresadu, sed ne senkuraĝiĝu pro tro frua provo legi ion vastvortaran aŭ kompleksecan), estas ofte konsilinde menci, ke ĉi tio estas “inteligenta legaĵo por adolta postkomencanto”, aŭ tio alia estas “vera frandaĵo, sed nur por spertaj legantoj”. Ni foje pensu ne nur pri legantoj, sed pri kursgvidantoj kaj bibliotekistoj.


3. **Ian ideon pri la stilo,** pli detalan ol la supra aludo al la lingva simpleco aŭ subtileco. Esperanta literaturo estas ankoraŭ en stadio, kie oni devas foje atentigi pri veraj eraroj semantikaj aŭ eĉ gramatikaj — nu, sed tiaĵojn mi foje rimarkas, malgrandkvante, eĉ en anglalingvaj verkoj de merite renomaj verkistoj! — Tamen, serioza recenzado ne dediĉas senproporcian spacon al troltrenado fiŝkaptanta nur kelkajn dubaĵojn pri ata/ita, kvin nacilingvismojn, kelkajn eraretojn verŝajne pro preteratento, aŭ kelkajn “neologismojn”. (Parenteze, vorto jam uzita ĉirkaŭ 1933, des pli, vorto, kiun Zamenhof mem proponis (ekz. *pigra, sob, sor, literatoro, iluminacio, sangvina*) estas en 1988 tre dube neo-a!) Kompreneble, konsterna pletoro de efektive nove proponitaj vortoj estas vera stilkarakterizaĵo detale ekzamenenda.

Stilo vere temas pri pli grandskalaj ecoj, ekzemple klareco, ritmo, koncizeco, elokvento, vivaj metaforoj, uzo de tropoj diversaj, spriteco, kompleksaj pensoj, logiko, konsekvenco, elvokivo, uzado de aludoj kaj subsugestoj; starpunkto sur la longa kontinuaĵo inter tradicio/imitado kaj eksperimento/avangardeco; vivŝajnaj konversacioj, elegantaj epigramoj, potencaj kontrastoj, variaj fraz-strukturoj; rimedoj delikataj aŭ drastaj, eĉ efike (aŭ nur ĝene!) krudaj; ironioj, atentigaj surprizoj, erudicio, naivo aŭ falsnaivo, satiro, parodioj, kredigaj detaloj, bonaj ekzemploj klarigaj, brila plenuzado de la specialak ecoj de Esperanto, brile trafaj ekvivalentoj en tradukoj malfacilaj... ni povus kotopi longe, kvankam kompreneble ni ne serĉus ĉiujn stilfaktorojn en unu verketo.

Ni memoru, ke ĝusta lingvouzo (ĝusta lokado de akuza-tivoj, korelativoj, iĝ/ig, ĉiu vorto laŭ sia ĝusta senco, ktp) estas universala devo de verkistoj; sed ke **stilo** estas io



individua: vidu la brilan *Specimene* de Baupierre! La verkoj de bonaj prozistoj kiel, ekzemple, Baghy, Francis, Neergaard, Nemere, Schwartz, Waringhien, tre klare malsimilas stile unu al la alia. Plej ofte, la plej bonaj aŭtoroj havas la plej diferencajn stilojn kune kun la plej malaroganta obeado al la fundamentaj lingvoleĝoj kaj konataj lingvaj precedentoj. Plue, tre lertaj aŭtoroj ofte modifas siajn stilojn taŭge por siaj celoj. Ekzemple, dialogo en dramo, kiun aŭdantaro devas kapti tuj per unu aŭdo de novaj voĉoj, devas esti pli stile simpla ol subtila psikologia romano, kiun ĉiu povas legi laŭ propra rapideco, aŭ relegi.



Ĉi tio gvidas nin al kvara punkto, kiun oni havas en ideala recenzo, kvankam foje rekte, foje nur implice:

4. La leganto ricevu **ian bazan koncepton pri la celo de la verko, kaj ian ĝeneralan takson de la sukceso rilate al la celo.** Oni ne riproĉu al *La verda koro* aŭ *Gerda malaperis!* pro ia stila minimumeco, granda simpleco; la verkistoj (kiuj pruvis sian kapablon verki pli riĉe) tie pensis pri komencantoj, do taksado devas esti parte literatura, parte pedagogia. Oni ne demandu, kial estas malfacile kanti la poemojn de Auld, de Kock, Ragnarsson; aŭ riproĉu Szathmári, ĉar li ne kreas riĉe kredeblajn personojn; aŭ plendu pri la manko de tragikosento en la skeĉoj de Potts aŭ MacGill; ni decidu pri la intenco de la aŭtoro, kaj ĉu ĉi tiu plenumis sian intencon.

Tiuj kvar esencaj informoj ebligas al leganto racian decidon, ĉu li aŭ ŝi deziras aĉeti la libron, aŭ almenaŭ rigardi ĝin por decidi.

Recenzisto havas ankaŭ ian devon rilatan al literaturaj kriterioj. Ofte komparo estas utila: ekzemple, kontraŭmitaj poemoj de Baghy aŭ Auld montras per komparo la artisman malplenecon, ofte senvalorecon, de tiuj nerealistisme unuflankaj, nur sloganecaj versaĵoj pri “paco” kiujn ni foje vidas; tedan, eksmodan lernolibron oni povas kompari kun io pli interesa kaj simpatia; dramo povas esti kompetenta sed ne atingi la nivelon de Flourens, Dorno, Filip kaj aliaj. Tamen, ni ne superflue humiligu utilulojn kun limigitaj talentoj: ĉiu literaturo konsistas plejparte el meznivelaj verkoj.

Okazas malofte, sed kiam okazas, estas atentigende, ke iu verko vere modifas la perspektivon de Esperanto, etendas ĝiajn pruvitajn eblecojn, larĝigas nian kulturon grave: ekzemple, siatempe, la zamenhofa *Hamleto*, *Streĉita kordo*, *Metropoliteno*, *La infana raso*, *Retoriko*, *Esperanta antologio*, *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj*, *La nobla Korano*, *Plena ilustrita vortaro*, diversmaniere. Tiajn verkojn oni devas recenzi longe, serioze, detale.



Recenzisto havas devon unue el la legema publiko, due al nia literaturo, kies prestiĝon kaj kriteriojn li aŭ ŝi serioze prizorgadu; sed ekzistas ankaŭ devo al la verkistoj: devo, ne de senproporcia indulgemo — devas esti kriteriaj limoj — sed de inteligenta humileco, justemo kaj deca ĝentileco.

Eble surprizos plurajn mia emfazo pri humileco, eĉ inteligenta: sed mi kredas ĝin esenca eco de la plej bona kritikado — ne nur pri literaturo, sed pri, ekzemple, kongreso, teatra prezentado, kurso — aŭ vivostilo de la najbaroj. Ni ĉiam memoru, ke estas pli facile, rimarki kelkajn neperfektaĵojn en farita verko, ol verki ion samampleksan. Serioza recenzo kutime kostas al mi plurajn tagojn, sed la recenzita verko kostis eble monatojn aŭ eĉ jarojn. Ni ĉiam memoru, ke nia propra juĝo ne estas dia aŭ eĉ definitiva; ĉiu havas proprajn scio-limojn, perceptolimojn, subjektivaĵojn, antaŭjuĝojn. Ni ĉiam eklegu verkon, kvazaŭ atendante ion bonan, pretaj peni kompreni, emaj ŝati, emaj cedi al la ĉarmo aŭ energio aŭ argumentoj de la libro. Ne necesas timi, ke ni tro pretervidos difektojn — ni povraj tre neperfektaj homoj terure inklinas rimarki la neperfektaĵojn de aliaj!

Recenzistoj de Esperantaj libroj ofte havas unu apartan problemon; ni ofte devas recenzi verkon, kiu venas el kulturo tre fremda al la nia; la plej granda malhelpo ne estas pro la fremdeco, pri kiu ni konscias (franco scias, ke rizo pli gravas al ĉino ol pano), sed pro diferencoj inter tiuj supozoj, tiel esencaj en nia kulturo, ke al ni ili ŝajnas universalaj: supozoj, ekzemple, pri la proporciaj gravecoj de individuo kaj komunumo, aŭ la dezirindeco de filoj. Ni do iom observu kaj moderigu nian supozemon.

Ni pli saĝe (kaj juste) rifuzu recenzi libron, pri kiu ni estas vere nekompetentaj; ni ne hezitu konfesi, ke ni estas nekompetentaj pri iu flanko, ekzemple, mi povus iom recenzi tradukon el la japana, sed informus klare, ke mi ne scipovas la japanan. (Kaj, leginte diversajn recenzojn, mi foje emas flustri aldone, “Kaj ni honeste penadu konstati niajn proprajn nekompetentecojn!”)

Ni memoru, ke beletristikaj terminoj mem ne ĉiam estas fidindaj: *aliteracio*, *kvinjambo*, *metonimio*, *afikso* havas precizan signifon, saman por ĉiuj; sed *sentimentala*, *pornografia*, *burĝa*, *subjektiva*, *realisma*, eĉ *teda* aŭ *bela*, estas tre lozaj konceptoj, kies interpreto varias de homo al homo.

Mi opinias, ke recenzisto pri Esperantaj libroj devas resti iom pli ĝentila, ol estus devige por nacilingva verko: neniuj verkas Esperante, celante monprofiton; ĉiuj verkistoj kaj eĉ eldonistoj agas pli-malpli sinofere. Kvan-



kam esceptoj ekzistas, nura esperantistiĝo mem plej ofte implicas ian parte altruisman motivon. Escepte de kelkaj registaraj aŭ similaj propagandaĵoj, aŭ obsedaj polemikaĵoj, ia sincera bonintenco, ia kulturemo probable estas. Nu, altruismo kaj sincereco tute ne garantias bonan kvaliton. Se oni rimarkas mankojn, estas nia devo atentigi pri ili; sed ĉiu mallaŭdo restu dolora devo. Kiam mallaŭdo iĝas plezuro, ekmultiĝas kancerĉeloj de malico; venas la momento por rezigni dum tempo pri recenzado; oni komencis senti, ke la recenzisto pli gravas ol la literaturo. Se mallaŭdo necesas, ni analizu la difektojn inteligente — eble helpe ne nur al legonto, sed eĉ al aŭtoro. “Malbona stilo” povas signifi nur personan antipation; “La frazoj tro longaj kaj ofte strange torditaj, disigante vortojn normale kunligitajn, malhelpas rapidan komprenon” vere diras ion. Kaj eĉ kiam, tre malofte, necesas severe kritiki por diri la veron, ni ĉiam memoru, ke eĉ unu superflua sarkasmo, unu ekstra malafabla vorto, unu mallaŭda troigo retorika, ne estas atestaĵo pri nia lerta-sperta lingvo-uzado: ĝi estas tutsimple malnobla malicaĵo. Mildeco kaj modereco, iom da kompata takto al alia persono kiu penas kontribui al nia minoritata, sinoferiga kulturo, ne kontraŭas firmecon kaj kriteriojn.



Ni en Esperantio ne infektiĝu per malsano, kiun mi ofte rimarkis en nacilingvaj recenzoj: tiel granda ŝvelado de la kara MIO (ne necese kun la vorto “mi”), ke ĝi iĝas pli grava ol la verko: kiam la recenzisto tiel insiste montras siajn malnaivon, netrompeblecon, superan komprenon kaj klarecon, lertan inventemon de brilaj frazoj, ke — li apenaŭ informas pri la verko recenzata. (Fakte mi eĉ suspektas, ke troa timo pri naivoŝajno estas ĉefa morala kaj intelekta malsano de multaj intelektuloj.) Kaj laŭeble ni evitu klikojn, lingvajn obsedojn, eble eĉ skolojn, kaj ne oferu recenzan honestecon al amikecoj aŭ (kutime dekfoje pli malbone kaj distorde) al malamikecoj.

Mi penis skizi supre ian simplan principaron por verki bonan recenzon; sed kutime io alia grava limigas eblecojn por bona recenzado: spaco-manko. Preskaŭ ĉiuj recenzoj devas esti tro mallongaj por inkluzivi ĉion dezirindan, kaj devas tro simpligi por esti tute justaj. Kontraŭ tiu problemo ne ekzistas memevidenta rimedo praktike ebla. Apenaŭ eblas recenzi ideale: se mi sugestas principojn, povas esti nur kun la sinteno de tiu kokinaro-mastro, kiu starigis en la kokinejo strutan ovegion kun avizo: “Rigardu ĉi tion kaj faru vian plej bonan eblan.”

Marjorie Boulton (Anglio)

Recenzoj

Fundamente malforta malgraŭ longa laboro

Dictionarium museologicum, ICOM International Committee for Documentation (CIDOC) Working Group on Terminology. Ĉefredaktistoj István Éri, Béla Végh. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 55 + 774p. 24cm. Bind. ISBN 963-571-174-3. Prezo: 150,00 gld.



“Muzeologio” ne estas konata de PIV, nek “museology” de Shorter Oxford English Dictionary. Montriĝas, tamen, ke ĝi estas la scienco de la muzeoj; jen dika volumo dediĉita al ĝiaj terminoj en dudek diversaj lingvoj. Malgraŭ la titolo (latinaĵo por “muzeologia vortaro”), temas ne pri vera vortaro, sed pri “speciala plurlingva vortlisto kun teknikaj terminoj rilatantaj specife al muzea laboro”. Mi citas el la esperantlingva antaŭparolo (korektante ĝian presaron), ĉar tiu ĉi granda verko havas ne nur Esperanton inter siaj dudek lingvoj, sed ankaŭ nian Hungaran Esperanto-Asocion kiel eldoniston. La volumo prezentas la fruktojn de plurjara internacia terminologia laboro, en kiu partoprenis interalie la esperantistoj B. Golden kaj T. Sekelj. Ĉio estas sub aŭspicio de Internacia Konsilantaro de Muzeoj kaj de Unesko.

La verko havas du ĉefajn partojn. Unu konsistas el 1632 numeritaj terminoj pri la organizado kaj aranĝado de muzeoj, alfabeto aranĝitaj laŭ la anglaj terminoj, kun ekvivalentoj laŭvice en la franca, hispana, rusa, germana, bulgara, ĉeĥa, dana, Esperanto, finna, hungara, itala, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, serbokroata, slovaka, kaj sveda. La dua parto estas alfabeto ordigita listo por ĉiu aparta lingvo. Salutinde estas, ke inter tiuj lingvoj troviĝas la Internacia Lingvo Esperanto; sed mi miras, ke tute mankas la araba, la ĉina kaj la japana (por menciigi nur la plej frapajn). Ĉu Unesko kaj ICOM interesiĝas nur pri Eŭropo?


Kvankam la verko evidente havos utilon por “muzea personalo” (termino n-ro 1038) kaj por interpretistoj kaj tradukistoj, ĝia utilo por la laiko estas severe limigita pro la manko de difinoj ĉe la terminoj. Ekzemple: por n-ro 138, angle “biotope”, aperas nur nuda listo de “biotopo/biotop/biotooppi/biotoop”-oj. Ĉe la Esperanta termino (“biotopo”) aperas averto, ke temas pri neologismo, sed nenie estas indikita la signifo de tiu vorto. Kie la angla kapvorto estas komunuza sed multsignifa, oni troviĝas en vera perplekso. Ekzemple, kio estas “punch”, n-ro 1271 — ĉu ilo, ago aŭ la rezulto de ago? La aŭtoroj de la Esperanta parto interpretis ĝin kiel agon, “ŝtancado, punzado” (tiel klarigante la misteron per du nedifinitaj neologismoj: ĉu ne sufiĉus “truado”?).

Tia ŝanceliĝado inter pluraj eblaj solvoj, cetere, estas tro ofta en la Esperanta parto: ni ne bezonas ĉiujn tri el “fermcirkvita televido”, “interna televido”, “fermitcirkvita televido” (207).

Fundamenta eraro ĉe tia kolekto da lingvo-ekvivalentoj estas la antaŭsupozo, ke ekzistas izomorfeco (preciza



La roterdamaj muzeoj, kelkaj merite famaj, atendas muzefervorulojn — kun aŭ sen vortaro!



respondado unu-kontraŭ-unu) inter la vortoj de diversaj lingvoj. En la vera mondo, vorto de unu lingvo povas parte kovri la semantikan terenon de pluraj vortoj en alia lingvo. Bona dulingva vortaro ne povas konsisti simple el unu celvorto por ĉiu fontvorto.

Ankaŭ la antaŭenmarŝo de la tekniko povas ŝanĝi senco-rilatojn. Ordinara fotokopio nun okazas plej ofte per kserografio. Pro tio, "kserokopio" (1625) povas esti konsiderata pli-malpli sinonimo de "fotokopio" (1169). Kion ni konkludu el tio, ke ni trovas la saman vorton ĉe tiuj du nocioj en la franca, finna, nederlanda kaj norvega, sed malsamajn vortojn en la aliaj lingvoj? (Respondo: ke temas pri multaŭtora verko kun malforta redaktado.)

Alia kritikindaĵo estas tio, ke preskaŭ ĉiuj terminoj estas substantivoj: malpli ol 1% estas verboj. Mankas eĉ la elementa verbo "registri" (novan akiraĵon), angle "to accession".

Inter la ĉ. 30 neologismoj de la Esperanta parto troviĝas kelkaj, kiuj utile ŝtopas breĉon: "dezajno" por formprojekto, formdesegnado, angle "design" (sed kial ne la pli internacia "dizajno"?); "printoj" por presaĵgrafiko, angle "prints", france "estampes"; "liofilizo" por frostsekiga konservado, angle "freeze-drying", france "lyophilisation"; kaj la serio "diateko, fototeko, videoteko" por kolektoj respektive da diapozitivoj, fotoj kaj vidbendoj.

J.C. Wells (Anglio)

Enkaĝigita pasio

La Libro de Nejma kaj la Libro de Adoro, Geraldo Matos. Chapecó: Fonto, 1985. Po 80p. Ilus. 21cm. Fontoserio 6 kaj 7. Prezo: po 12,00 gld.

"Ĉar pasio, kiel krimo," skribis iam Thomas Mann, "ne ŝatas ordon kaj normalan bonstaton, sed ĉiu difektiĝo de la socia aranĝo, ĉiu maltrankvilo kaj malfeliĉo en la mondo estas al ĝi bonvenaj, ĉar ĝi konfuze esperas trovi ian oportunon en ili." La seksimpulso do, ĉe profundaj homoj, povas renversi spiritajn ekvilibrojn, kiuj firme rezistis dum jardekoj; ĝi povas revolucie ŝanĝi la mondrigardon de "maturaĝa, alie aŭstera universitata profesoro", kiel difinas la aŭtoron la prefaco, de homo, kies literatura produktado en Esperanto, kvankam jam konsiderinda kaj internacie konata, subite soris kaj akceliĝis dank' al ĉi tiu senta kaj sensa tertremo. Centkelkdeko da sonetoj (la numerado ne ĉiam kongruas), verkitaj en malmultaj semajnoj, atestas pri eksterordinara sperto, kiun la poeto magme prilaboris, jam ĉe la limo de realo kaj fantazio; foje ĉi tiuj versoj estas malĉastaj, sed oni emas pensi la poeton pli ĉasta, ol li mem volus kredigi: finfine kiuj multe amoras, malmulte verkas pri tio, kaj de nia komuna majstro Auld ni scias, ke "poemo estas koito, / kiu ne okazis".

Nejma fariĝas mito kaj vera literatura persono ĝuste per sia malĉeesto: "vin havi skribe nur, kaj lege!" veadas foje la poeto (son. 67), kaj aliloke li esperas ĝui "la kulminan artoplenon, / sur ŝi ekversi, ne sur la soneto" (son. 124), kio evidente ne tre ofte okazas. Sed kompreneble ne tiom la efektiva biografio konsisto de Nejma gravas, kiom la pasio, kiun ŝi elvokas, kaj kiun la poeto vortumas en malmumaj, mirindaj versoj, kiel tiu, kiu malfermas la 50an soneton:

La nokto jam testudas al krepusko...

aŭ en la perfekta kvarverso, kiu solene uverturas la 41an, probable la plej sukcesan:

*La domon nun prilumas nur kandelo
tra densoj de inkuboj kaj tenebroj,
kaj loĝas ĝin fantomo per funebroj,
kaj spacon kirlas ombroj en ŝancelo...*

Foje simplaj amdeklaroj alternas kun Baghy-eskaj sezonkonfuzoj, en la kadro de sudamerika printempo:

*Mi amas nun. La fajro kaj la frosto
kuniĝas. Gajo kaj amaro tembras
en la printempo, kiu nun decembras:
ho amo, kiun sekvas granda kosto! (son. 49).*


Signifoplena, iel ideisma reeĥo de la poetaj sentoj en la naturo, kaj de la naturo en la klasikforma soneto.

Cetere la elekto de la soneta formo por erotika temo tuj elvokas memoron pri la *Sekretaj sonetoj* de Peter Peneter kaj pri la skolo, kiun ili naskis. Grave diferencas tamen la

helaj, eŭropece ironiaj versoj de la granda hungaro disde tiuj obsedaj, malesperaj de Geraldo Mattos; kaj certe la arda brazila poeto ŝajnas tre malproksima de la kaloĉaja klasikismo. Finfine, Mattos komprenas la kernon, nome, ke la regula, fermita formo de soneto simbolas ĝuste tiun "ordon kaj normalan bonstaton", kiujn laŭ Mann pasio devas malŝati; tian konkludon Kalocsay neniam atingis. Jen do alvenas tiuj mirindaj, metrikvariaj versoj, kiuj lukrecie lamentas:

*Tamen, la frumatenado estas proksima,
kaj ĝi portas la minimuman esperon,
ke mi havos alian formon por miaj doloroj.* " (son. 117)

Ĉi-volume vi ekkonos ne vulgaran libertinon, sed pasian, malluman poeton, kiu forĝas sian mortosenton el plej



materia erotiko, kaj kiu kortuŝite rimarkas en la lastaj tri versoj de la poemaro:

*... kaj ni, frutempaj orfoj de la ĝuo,
konstatas, ke la vivo nin arestas
por la persisto de la mortofluo.*

Maŭro Nervi (Italio)

Faklibro por ĉies uzo

Vetero kaj klimato de la mondo (1974), Denis Riley kaj Lewis Spolton. El la angla trad. Kris Long. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1987. 132p. 25cm. Ilus. ISBN 92-9017-035-2. Prezo: 28,50 gld.

Libroj eldonataj de la Eldonejo de la Universitato de Kembriĝo ĝuas bonan reputacion inter sciencistoj, ĉefe pro la alta faka nivelo. Rimarkinda estas ankaŭ la elekto de bonaj aŭtoroj. La populara scienca verko de Denis Riley kaj Lewis Spolton akiris favoron inter klimatologoj, kaj la iniciaton de UEA tradukigi ĝin el la angla en Esperanton oni devas opinii efektive konvena.

La libro prezentas novan manieron priskribi la klimaton de la Tero, kiu konsistas en rezigno pri la kutime abundaj statistikaj donitaĵoj: Laŭ sia karaktero, tiuj ĉiam priskri-

bas ion, kio jam okazis. Anstataŭe, la aŭtoroj prezentas meteorologiajn veterkreantajn procezojn, kiuj formas la klimaton de la diversaj regionoj de la Tero, ilustrante tion per sinoptikaj mapoj kaj ne rezignante tamen sciigi pri certaj mezaj nombraj valoroj kaj mezaj tempaj sinsekvoj.

Sume la libro plenumas duspecan rolon: ĝi donas al leganto bonan koncepton de klimatologia priskribo proponita de la aŭtoroj, kaj alportas samtempe sufiĉe grandan kvanton da sintezaj nombraj karakterizoj de diversaj klimataj zonoj (ĉefe en la formo de diagramoj). Malgraŭ paĝnombro negranda ĝi tamen havas zorge planitan skemon de temoj. Multe da konkretaj ekzemploj de veteraj situacioj en diversaj partoj de la mondo faciligas la klimatologiajn konkludojn. La tria parto traktas pri regiona klimatologio, kiu apogas sin je la klasifiko de G.T. Trewartha. Ĝi donas ankaŭ skizon de la klimatologio de urboj. La libro finiĝas per klarvida priskribo de la historio de la klimato de la Tero en la pasintaj geologiaj epokoj.

Ĝojigas zorgema eldona aspekto (pli ol 150 mapoj, diagramoj, fotoj kaj satelit-fotoj, indekso kun bona Esperanto-terminologio, interesa kovrilo), kaj la kompetenta traduko de Kris Long.

Elżbieta Nawrocka (Pollando)

Moderna ĉina literaturo el tumultaj tri jardekoj

Ĉina antologio (1919-1949). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 602p. 21cm. Bind. Ilus. Prezo: 21,00 gld.

Jen la dua verko el trivoluma antologio pri la moderna ĉina literaturo. Jam en la sesdekaj jaroj aperis libro dediĉita al la unua jardeko de la Ĉina Popola Respubliko. Trian volumon, kiu ampleksos la tempon de 1960-1980, nun preparas Ĉina Esperanto-Eldonejo.

La nun aperinta volumo do prezentas la plej fruan periodon de la moderna ĉina literaturo per entute 55 verkoj de 43 aŭtoroj, inter ili tiel famaj verkistoj kiel Lusin (Lu Xun, vernome Zhou Shuren), Maŭ Dun (vernome Shen Yanbing), Bakin (vernome Li Feigan), Guo Moĵuo (Guo Moruo), Ding Ling kaj Ju Dafu (Yu Dafu). La libro enhavas la literaturajn ĝenrojn novelo, raportaĵo, eseo kaj poemo; al ĝi kontribuis 28 tradukistoj, interalie konataj pioniroj de la ĉina Esperanto-movado kiel Elpin (An Ou-sheng), Venlo Fon (Feng Wenluo), S.J. Zee (Xu Sheng-yue), Pandiŝo (Pan Tishu) kaj Honfan (Zhang Hongfan). Aliajn tradukojn verkis nunaj kunlaborantoj de *El popola Ĉinio* kaj Radio Pekino.

La aŭtoroj de la verkoj kolektitaj en la libro apartenas al tiu generacio de ĉinoj, kiu la unua havis la eblecon lerni fremdajn lingvojn en junaĝo. Tiel ili povis konatiĝi kun alikulturaj scioj kaj literaturoj kaj studi verkojn de okcidentaj verkistoj. Influite de eŭropaj literaturoj ili ankaŭ enkondukis novajn temojn kaj formojn en la ĉinan literaturon. Multaj el ili estis krome eminentaj tradukistoj de okcidenta literaturo. Tiel la nun aperinta volumo, ebligante al la neĉina literaturamanto konatiĝi kun iliaj verkoj en traduko, kvazaŭ fermas la cirkon de la reciproka kultur-interŝanĝo kaj ĝuste en tio troviĝas ĝia valoro.

La aplikadon de nova verkmaniero ni trovas ĉefe en la ĝenro de la novelo, speco de mallonga rakonto, en kiu la aŭtoro skribas pri unu ĉefa evento laŭ iu difinita aspekto: pri la karaktero de iu individua homo aŭ pri siaj propraj spertoj. Tio estas grava ŝanĝo, se ni pripensas la fakton, ke en la malnova Ĉinio oni aprezis nur filozofiajn verkojn, estetikajn tekstojn kaj lirikon kiel literaturon, dum fabeloj kaj rakontoj ne estis konsiderataj kiel literaturo.

La tempo de 1919 ĝis 1949 estas la periodo de la disfalo de la malnova ĉina ŝtato, de la malkonstruiĝo de la tradicia socia ordo, kaj samtempe fazo de nova orientiĝo, dum kiu oni serĉis novajn valorojn por la literaturo kaj ekuzis la parolan lingvon por verkado. Temoj kiujn ni ofte renkontas en la libro estas la mizera vivo de malriĉaj kamparanoj, malgrandaj komercistoj, metiistoj, rikiŝistoj, senlaboruloj, almozuloj, fuĝintoj, soldatoj kaj homoj kriplitaj en la milito. Ĉar ne eblas priskribi la enhavon de ĉiuj verkoj, mi volas doni nur kelkajn ekzemplojn kaj iom skribi pri miaj impresoj.

Ne estas hazardo, ke la libro komenciĝas per la fama novelo "La taglibro de frenezulo" de Lusin. En tiu novelo la ĉefrolulo suferas de persekutmanio kaj daŭre sentas sin minacata de la socio, timante, ke aliaj homoj intencas manĝi lin. En tiu novelo la hommanĝo socio estas simbolo por la malnova ĉina socio, kiu estis tre malamika al la unuopa homo. Tiu verko, enhave kaj forme novstila, estas la unua novelo en la moderna ĉina literaturo.


Alia fama novelo, "La butikoj de familio Lin" de Maŭ Dun, priskribas la vivon de komercisto sur la fono de la detruado de la enlanda ekonomio. Lia butikoj fine bankrotas, ĉar li ne povas vendi varojn al kamparanoj, kiuj ne

enspezas sufiĉe da mono vendante siajn agrokulturajn produktojn, ĉar abundas importitaj varoj en la merkato.

Precipe impresis min la raportaĵo "Plendungitaj laboristinoj" de Ŝja Jan (Xia Yan, vernome Shen Duanxian), en kiu li priskribas la mizerajn vivkondiĉojn de junulinoj, kiujn posedanto de ŝpinejo kvazaŭ aĉetas en vilaĝoj por sklave laborigi ilin en sia fabriko en Shanghai.

Pri la poemoj mi volas diri nur, ke la tradukado de ĉinaj poemoj estas malfacila tasko, bone solvita en la libro. Tamen la tradukoj postulas de la leganto ne nur profun-

*La fama ĉina verkisto
Lusin estis ankaŭ
entuziasma subtenanto
de Esperanto. Ĉu
hazarde, ke revolucie
nova verkisto aprobis
revolucie novan
lingvon? Sed kial do
aliaj ignoris ĝin?...*



Morale forta post 1500 jaroj

Konsolo de la filozofio, Boethius (ĉ. 480-524). El la latina trad. Albert Goodheir (1912-). Glasgovo: Kardo, 1984. 146p. 21cm. ISBN 0 905 149 21 1. Prezo: 17,40 gld.

Boethius (Boecio), la romia filozofo kaj ŝtatestro, "la lasta romiano kaj la unua skolastikisto", vivis en la jaroj 480-524 de nia epoko. Li kreis la latinan terminologion de la logiko, tradukadis kaj komentadis la filozofon Aristoteles. Konatigis lin la verko *Konsolo de la filozofio*, kiun li kreis en karcero atendante la mortigon. Lia libro dividiĝas en 5 partojn; prozo alternas kun poezio. La enhavo kaj mesaĝo restis bedaŭrinde aktualaj ĝis hodiaŭ. Kiom da homoj senkulpaj kaj kondamnitaj atendas sian morton en tiu ĉi momento en la tuta mondo? Surbaze de la libro ni povas konkludi, ke esti mortigita ankoraŭ ne signifas esti morta. Boecio mortis siatempe, sed lia mesaĝo vivas kaj inspiras nin en aktualo. Ĝi inspiras nin al multaj profundaj ideoj, ekzemple kompreni, ke nur zorgo pri la pano ĉiutaga ne sufiĉas. Oni devas ankaŭ krei kaj realigi spiritajn valorojn, kiuj nin postvivis. Jes, ankaŭ vi veraj, profundaj kaj filozofiemaj esperantistoj, ankaŭ vi iras bonan vojon!

Traduki la verkon el la lingvo latina ne facilis. Mi kiel studento en la klasika gimnazio provis ellatinigi unu ĉapitron. Mi rezignis. La vortaro respegulas ne nur komplikan

lingvaĵon, sed ankaŭ tre diferencon atmosferon spiritan.

La normalan tradukiston povus krome fortimigi la fakto, ke la latina teksto estas verkita ne nur proze sed ankaŭ poezie. Feliĉe, d-ro A. Goodheir estas ne nur filozofanta poeto sed ankaŭ poezianta filozofo. Efike inspiras nin kiel legantojn lia lingva stilo. Domaĝe, ke por montri tion per ekzemploj mankas spaco en nia recenzo. Post kiam mi komparis mian propran tradukon kun tiu de A. Goodheir mi povas diri: lia teskto papilie multkoloras, mia ellatinigo paŝegas brontosaŭre. Li vere modernigis la lingvon latinan, transformante ĝin en la lingvon demokratitan por ĉiuj. Oni devas konstati, ke por leganto-neklasikulo malaperis multaj malhelpoj: ĉiujn nekonatajn malfacile kompreneblajn nociojn trovas la leganto en suplementa parto klarigitaj. Pri la vivo kaj verko de Boecio kaj cirkonstancoj de lia mortigo ni trovas informojn en la antaŭparolo.

Epiloge mi volas aldoni kelkajn personajn demandojn. Unue: kiel eblas, ke la saman libron prijuĝas kritikistoj kontraŭstare? Ŝajnas al mi, ke ni kritikistoj similas al serĉantoj de akvo en dezerto. Se ni trovas diamanton, la afero nin ne interesas. Do ni tro serĉas nur niajn konceptojn, interesojn, bezonojn. Laŭ nia nivelo ni juĝas nivelon de la aŭtoroj. Ĉu tio helpas al la legantaro? Due: ĉu la aĉetonton de la libro povas ĝojigi la fakto, ke por publikigi recenzon pri tiom grava libro ni bezonis preskaŭ 4 (!) jarojn? Kiel do eldonadi, aĉetadi kaj legi librojn pri kiuj mankas informoj?

L. Podmele (Ĉeĥoslovakio)

dan lingvoscion, sed ankaŭ tempon por relegado kaj pripensado.

Ĝenerale oni povas diri, ke la libro estas zorgeme eldonita. Ĝi enhavas enkondukon kaj biografiajn notojn pri la aŭtoroj (mankas informoj nur pri du aŭtoroj). Ĉiuj tradukoj estas flue legeblaj kaj bone kompreneblaj pro la klarigoj de propraj nomoj, ĉinaj manĝaĵoj, iloj, festotagoj kaj tradiciaj kutimoj. La libro estas bone presita (troveblas nur tre malmulte da preeraroj), bele bindita kaj enhavas 15 tutpaĝajn ilustraĵojn. Do impona libro, kiu pliriĉigis la tradukan literaturon por tutmonda esperantista legantaro.

Slava Gärtner (FR Germanio)

Tro perfekta tezo psikologia

Serĉu mian sonĝon, István Nemere. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 171p. 20cm. ISBN 963 571 181 6. Prezo: 18,00 gld.

Ŝajnas, ke malmultaj aŭtoroj scias tiel bone priskribi psikologiajn mikroklimatojn, kiel István Nemere: situacioj, kie daŭra premo de l' pasinto, angoro de iu kulposento aŭ forto de la dubo traboras la menson de liaj herooj, obsede revenas de romano al romano.

Eble ĉi tie, ĝuste pro la elektita temo — ĉu diri preteksto? — Nemere ankoraŭ pli lerte scipovis dissekci la spiritojn (tro lerte? Ni tion vidos poste...). *"La sorto de armenoj — estis ankaŭ lia sorto. Kaj kiam kun dentojn grinciga rezigno li konstatis, ke li ne povas entrepreni ĉiujn aferojn, ke neniam li fariĝos simbolo, ekzemplo, amata patro de kvin miliardoj da homoj — li turnis sin el siaj samsortanoj. La malnova historio ardigis lian sangon. Li ekmalamis la turkojn."* (Serĉu..., p. 92-93). Tiel Diran, juna armeno, iĝas teroristo — almenaŭ ni nomas lin tia; li sin taksas justulo, memkompreneble.

Gábor kaj Lilla, juna paro vojaĝanta al Venecio, hazarde renkontas Diran-on: li fakte iam laboris en Turkio kun Gábor. La sinteno de Diran ŝajnas al ili strangeta, sed ili neniel suspektas, ke li venis en Venecion por helpi al murdo de la baldaŭ alvenonta turka prezidanto.

Laŭ sia kutima maniero, István Nemere plektas du paralelajn spacotempojn, kaj ludas per lerta alterno: la ritmon li sukcesas variigi laŭ la cirkonstancoj; malrapide kaj preskaŭ mola komence, ĝi freneziĝas ĉirkaŭ la atencosceno. Neniam la aŭtoro arogas al si la rajton juĝi la teroriston Diran, aŭ eĉ pli ĝenerale la terorismon; Diran aperas al ni pli naiva/simpatia ol fundamente malbona. La juĝo estas aliloke, kaj ĉiuj klopodoj kaj suferoj de Diran finfine pruviĝas vana sinofero. Almenaŭ vana por la fiksitacelo, sed utila tamen por la juna paro, kiu dank' al ĉi tiuj okazaĵoj trovas multe pli profundan "animagordon". Do, vivo venkis.

Bone, bonege, eĉ eble tro bone: kion riproĉi al István Nemere? Nek la priskribojn de Venecio, kolorplenajn, nek la ritmon de l' agado (oni legas la tutan romanon kvazaŭ unuspire), nek la psikologiajn notojn pri angoro, dubo, pudoro, tiom delikate ĉizitajn. Sed io ĝenas...

"Dumtempe mi konscias ankaŭ tion, ke tro bele mi formas la frazojn, tro elegante mi parolas. Kvazaŭ ne temus pri sentoj, kvazaŭ estus mi recitanta tekston jam antaŭe

ellernitan. Sed ja nur tiele mi scipovas paroli. Samkiel mi verkas. Malsano pro metio." Ne mi, sed ja István Nemere mem skribis tion en romano *Febro* (p. 65). Kaj verŝajne en *Febro* ja troviĝas pri Nemere abundo da membiografiaj notoj: mi emas supozi, ke ĉi tiu estas reale membiografia. Efektive, jen por mi la tikla punkto: oni kutimas juĝi, en Esperantio, la verkojn laŭ ilia (ne)"profesieco". Paradokse, mi trovas, ke *Serĉu mian sonĝon* estas/aspektas tro "profesie" verkita!

Mi ne povas doni precizan ekzemplon: temas pri ĝenerala impreso. De post 1981 (jaro en kiu *La Kancerkliniko* aperigis du novelojn poste represitajn en "La naŭa kanalo"), István Nemere publikigis 7 romanojn en Esperanto, kaj tio faras el li ege produktivan verkiston. Sed kelkaj stilartifikoj iĝis manioj, el ili ĝuste la plektaĵo de paralelaj agadoj, tro sistema. Ankaŭ la uzo de iuj vortoj aŭ frazoj, kiujn oni trovas tro ofte en similaj cirkonstancoj. Kiel artamanto, mi ege preferas rigardi skizojn ol finpoluritajn pentraĵojn, tial, ke la unuaj ŝajnas preskaŭ senperaj fruktoj de l' artista esprimvolo, dum la aliaj ĝenas min pro la tro videbla metio, kun ĝiaj artifikoj. Rigardu al skizoj de Rembrandt aŭ de Delacroix: jam ĉio estas en ili.

Eble io tia ĝenas min en *Serĉu mian sonĝon*: io tro finpolurita, kvazaŭ la aŭtoro metus grandegan distancon inter si mem kaj siaj kreitaĵoj, kvazaŭ li simple manipulus marionetojn kaj uzus ilin por demonstri iun tezon.

Laŭrenco Septier (Francio)

Admirinda vestaĵo por gaja fripono

Amuza legado pri Til' Strigospegul', Hermano Boto (ĉ. 1467-ĉ.1520). El la germana trad. Rikardo Ŝulco. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1987. 376p. 21cm. Ilus. ISBN 3-922570-47-X. Prezo: 45,00 gld.

Til' Strigospegulo estas fripono, pri kiu ekzistas tuta aro da anekdotoj. Liaj "viktimoj" ofte estis anoj de l' pastraro aŭ riĉuloj. Tio kompreneble ne malmulte kontribuis al la populareco de liaj aventuroj. Famiĝis liaj friponaĵoj ekde la komenco de la 16a jarcento: liaj kritikado kaj ridindigo — kulturhistorie — venis ĝustatempe. Tamen, ankaŭ ĉe generacioj pli postaj neniam mankis intereso pri liaj agoj kaj diroj: La rakonto-ciklo daŭre apartenas al la ŝatataj legaĵoj de junaj kaj maljunaj, ĉu en la origina formo, en traduko aŭ porinfana prilaboro.

Germana fakulo Honegger konvinkis la Esperanto-tradukanton Ŝulco per sia studaĵo, ke la strasburgaj eldonoj de 1510-11, 1515 kaj 1519 estis verkitaj de Hermann Bote. Nederlandlingva studaĵo fare de Loek Geeraedts (Amsterdam 1986) tamen venis al la konkludo, ke tio nepre ne eblas: Male, Bote verkis la **malaltgermanan** tekston, kiu estis la bazo de la antverpena eldono el la unua duono de l' 16a jarcento. La altgermana estus traduko el tiu ĉi! Kiel ajn — la strasburga germana eldono nepre estas la plej kompleta, kaj do tute prave Rikardo Ŝulco elektis por traduki ĝuste la strasburgan tekston.

La verko estas en sia Esperanta versio leginda kaj tre amuza, kvankam — konforme al tiutempaj gustoj — ne ĉiam plej delikatsenta. Ŝulco eĉ plilegindigis ĝin, aldonan-

te al ĉiu historiĉeto serenaj komenton — ĉu pri neverŝajneco en la okazaĵo, ĉu pri teksta eraro, ĉu pri trajto ĝenerale homa ktp.

Traduki tiajn klasikajn popolecajn verkojn estas entrepreno sufiĉe riska, kiu postulas grandan fakulecon. Arkaiĝintan lingvaĵon oni ja ne senpere traduku en lingvon neologismoplenan. (Ŝulco ja uzas neologismojn, sed tre ŝpareme kaj saĝe singarde.) Aliflanke, plej simpla ĉiutaga parola lingvo eĉ plie ne akcepteblas. Kion do fari? Ŝulco trovis rimedon, kiu faras la legadon de *Til' Strigospegul'* tre unika aventuro: preskaŭ nenie renkontiĝas vorto, kiu estus ne-ĉiutaga; tamen la legantaro absorbiĝas de certa ĉiea fremdeco pure lingva. Tion la tradukinto sciis atingi per a) maksimuma obeemo al la vortsinsekvo germana; b) plej senĝena uzado de kunmetitaj verboformoj; kaj c) mi diru: tre skema lingvaĵo.

Por doni (hazarde prenitan) ekzemplon: je paĝ. 236: "Ili parolis, ke Strigospegul' estas veninta en la domon kaj parolinta, ke oni estas donacinta al la mastro grandan sturgon, ke tiun ili helpu porti hejmen. La fajfilfaristo koleriĝis kaj diris al la virino: 'Ĉu ci ne estas povinta resti



Ilustraĵo al la okdek naŭa historio de Ŝulco.

hejme?"". Tio efikas nepre fremdige, kaj ĝuste ĉe arkaika teksto kiel tiu ĉi, tiu efiko estas plej oportuna. Plifortigas la fremdiĝon de l' leganto la intenca uzado de pronoma ripeto de subjektoj (tipo: "Til' Strigospegul', tiu/li parolis") kaj la konscia misuzo de verboformoj en objektaj subpropozicioj (tipo: "mi vidis, ke li alvenis", anstataŭ: "ke li alvenas").

Tiun ĉi solvon mi ĉi-libre sincere admiras, kvankam oni ne povus proponi tian lingvouzadon por ĉiuspecaj verkoj. Ĝi multe superas miakomprene antaŭajn provojn, redoni arkaikaĵojn. La libron kompletigas la originaj (kaj originalaj!) bildoj, klaraj enkonduko, postparolo, bibliografieto kaj nomlisto kun nacilingvaj formoj: entute tre kompleta kaj tre inda eldono.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Lingvo centjara, lingvo erara

Nuntempe trakuras Esperantujon amas-histerio, kaŭzita de la ŝajne nehaltigebla inundo de miriado da novaj vortoj, plejparte proponitaj kaj uzataj fare de apogantoj de la piĉismo kaj la rumlerismo. (Tiuj du neologismo-maniaj doktrinoj estas baptitaj laŭ la nomoj de la fondintoj, Karolo **Piĉ** kaj Josef **Rumler**.) Rezulte de la alarmo, kiun sentas pluraj esperantistoj pri tiuj provoj senlime ŝveligi la vortprovizon de Esperanto, estas malfacile nuntempe atentigi la verdan publikon pri eĉ pli grava minaco kontraŭ la sana evoluo de la lingvo. Temas pri subnorma lingvouzo, ne nur en la parola sed ankaŭ en la skriba lingvo. Dum 1987, la Jubilea Jaro de Esperanto, estis aranĝitaj pluraj esperantologiaj konferencoj, en kiuj multenombra erudicia partoprenantaro pridiskutis plej profundajn, eĉ esoterajn aspektojn de Esperanto, sed laŭ mia scio neniu programo estis dediĉita al sobra analizo de la universallaj kaj konstantaj lingvaj eraroj faritaj de uzantoj de Esperanto.

Parolante pri la dua Universala Kongreso en 1906, Kabe (longe post kiam li kabeis) faris jenan komenton: "La Esperantistoj, jes, ili havas multajn mankojn. Antaŭ ĉio ili ne scias sian lingvon! Ili tiel malbone parolis (ekzemple sur ŝipo sur Ĝeneva Lago), ke mi petis paroli al mi en nacia lingvo kaj mi respondos Esperante."¹ Ŝajnas, ke nuntempe la temo de lingva perfektigo ĉe adeptoj de Esperanto estas tabua, kaj oni ne emas malkaŝe respondi jenan demandon: ĉu, post unu jarcento da uzado de Esperanto, ĝenerale pliboniĝis la lingvouzo, ĉu ĝi stagne restas sur la sama nivelo kiel ĉe la komenco, aŭ ĉu videblas signoj de dekadenco? Ankoraŭ unu demando: ĉu ekzistas aspektoj de la Esperanta gramatiko, kiuj ne estas alproprigeblaj? Kion diri pri la uzo de la difina artikolo? En la franca, rusa kaj Esperanta versioj de la Fundamenta Gramatiko troviĝas jena frazo: "La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon povas tute ĝin ne uzi." En *Fundamenta krestomatia* estis aldonitaj la vortoj "en la unua tempo". Nu, tiu "unua tempo" ja longe daŭris — tutan jarcenton! — ĉar ankoraŭ hodiaŭ estas esperantistoj, plejparte parolantoj de slavaj lingvoj, kiuj ne kapablas ĝuste uzi la difinan artikolon en Esperanto. Eble ili sukcesos en la dua jarcento.

En 1907 Émile Boirac, skribante pri la lingvonivelo de verkoj en la literatura konkurso de *La revuo*, listigis la plej oftajn malkorektaĵojn, inter kiuj estas la sekvaj: uzado de vortoj, ĉu ne-Esperantaj, ĉu laŭ malĝusta signifo; misuzo de kunmetitaj tensoj de verboj; uzado de pasivaj participoj de netransitivaj verboj; superflua uzado de la sufiksoj "aĵ" kaj "ig"; malĝusta uzado de posedaj adjektivoj; uzo de la akuzativo post netransitivaj verboj aŭ post prepozicioj ne postulantaj ĝin. Boirac finis sian kritikon per la konsilo, ke esperantistoj "pli zorge lernadu la gramatikon antaŭ ol provi denove beletristikan verkadon."² Tiuj trafaj vortoj estas ripetindaj ankaŭ hodiaŭ kun jenaj modifoj: Ne temas nur pri la beletra lingvouzo, kaj al la listo de oftaj eraroj, kiu aperis en *La revuo*, estas eble aldoni plurajn aliajn ekzemplojn.

La paronimia plago en Esperanto

Ekzemplo de universala malfacilaĵo estas paronimaj vortparoj aŭ grupoj. Laŭ *Plena ilustrita vortaro* (PIV), paronimo estas “vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sen- ce malsama”. En pluraj artikoloj mi argumentis kontraŭ la formado de novaj paronimoj en Esperanto, ĉar eviden- tas, ke tiuj, kiuj jam ekzistas en la lingvo, estas daŭraj kaj insidaj kaptiloj. Kiom da uzantoj de Esperanto povas sen- hezite ĝuste uzi en frazo ambaŭ erojn de la sekvaj paroj: domaĝi/damaĝi, kompensi/rekompenci, oferi/oferti? Kiam mi kritikis la enkondukon de la neologismo “denonci”, ĉar “denunci” jam troviĝas en la lingvo, kaj malrekomendis pluan kreadon de paronimoj en Espe- ranto³, Ivo Lapenna provis refuti mian rezonadon jene:

Komuniko de la Akademio de Esperanto:

La lingvo-problemoj ŝprucantaj el la ĉiutaga vivo de nia Esperanto-mondo ampleksiĝas en nemezureblajn dimensi- ojn kaj la Akademio de Esperanto devas dinamike adaptiĝi al ĉiam novaj cirkonstancoj.

La Akademio plene konscias pri la gigantaj taskoj, kiujn ĝi devas alfronti: a) ĝuste aŭskulti kaj rapide respondi al la de- mandoj de esperantistoj, b) konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon.

Por plene ludi sian rolon, la Akademio... devas nepre dis- poni pri la necesaj financaj rimedoj, kiuj ebligas kunordigi la laborojn de la 45 Akademianoj loĝantaj sur kvin kontinentoj.

Tial la Estraro de la Akademio decidis krei “ian klubon de la Amikoj de la Akademio de Esperanto”, kies ĉefa rolo estos trovi ĉiaspecajn rimedojn kaj subtenojn, kaj eldoni informan bultenon *La Letero de l' Akademio de Esperanto*.

Jam aperis la unua numero. Informojn pri la Amikoj kaj la *Letero* kontraŭ respondkuponon vi ricevos de la ĉi-suba adreso:

La Amikoj de l' Akademio de Esperanto
5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio

“La fakto, ke ne ‘esperantistoj’, sed **malbonaj sciantoj de Esperanto**, ‘ne scias ĝuste uzi paronimajn parojn’ ne povas pravigi forigon de paronimoj aŭ kontraŭstaron al enkonduko de novaj, se vere necesaj.”⁴ Bedaŭrinde, Lapenna tro facilanime eldiris sian opinion, ĉar en la **sama** numero de *Internacia Jura Revuo* mi trovis, ke unu kolego de Lapenna konfuziĝis pri la uzo de la paro “adapti/ adopti”, kaj alia kolego stumblis ĉe la paronimoj “arbitra/ arbitracia”! Kaj kion dirus Lapenna nun, se li povus legi en la Jubilea Libro de Akademianoj en artikolo de ankoraŭ unu el siaj kolegoj, jenan frazon: “Iliaj [sintenoj] oscilas inter du poloj...”⁵ Ĉu estas “malbonaj sciantoj de Esperanto” kaj la prezidanto de la Akademio de Esperan- to kaj la redaktoro-Akademiano de la koncerna libro, ĉar ili ne scias la diferencon inter “polo/poluso”?

La transitiveco de verboj

Ankoraŭ unu nesuperebla malfacilaĵo de Esperanto temas pri la transitiveco de verboj. Gramatikistoj konsi- las, ke oni konsultu vortaron por ekscii, kiel uzi verbon, sed ne ĉiuj vortaroj donas tiun informon aŭ ili ne akordas. Plue, oni kutime ne **parolas** Esperante kun vortaro en la mano, do la konsilo estas malesperiga. Du ekzemploj de la misuzo de verboj el la plumo de ankoraŭ unu Akademiano ilustras, ke ne temas pri imagita problemo. En artikolo pri

Esperanta literaturo aperas jenaj frazeraj: “ideologie avancitaj tavoloj” (anstataŭ “avancintaj”) kaj “la kom- paro... ne rezultigis malfavora” (anstataŭ “rezultis”).⁶ Boirac pravis, ĉu ne?

Draŝantaj recenzoj

Unu el la oftaj temoj en recenzoj pri verkoj en Esperan- to estas komento pri lingvouzo. Tipa estas jena kritiko fare de fakulo: “La tekstoj ĝenerale estas bone komprene- blaj, sed estas tre bedaŭrinde, ke la eldonejo ne petis al lingve kompetenta esperantisto kontroli la tekston, ĉar svarmas gramatikaj kaj aliaj lingvaj eraroj.”⁷ Por apogi la kondamnon de nerevizitaj aŭ nekontrolitaj publikig- aĵoj, jen citaĵo el ankoraŭ unu recenzo: “Povus temi pri ĝuinda romano... se la traduko estus apenaŭ lingve akcep- tebla. Sed eraroj gramatikaj, sintaksaj, leksikaj, stilaj spi- cas ĉiun paĝon, preskaŭ ĉiun frazon.”⁸

La lernado de Esperanto dum la dua jarcento

La plej bona konsilo, efektive, la propaganda slogano por la dua jarcento de Esperanto estu: “Esperanton plej necese devas lerni la Esperantistoj mem!” Tiujn vortojn, gravedajn de signifo, diris Kabe en la jaro 1906.⁹ Ĉar la lernado estis mankhava dum la unua jarcento, en la eston- teco novaj kaj drastaj rimedoj estas aplikendaj. Analizado de la fakta lingvouzo havas gravan signifon por planado kaj direktado de evolutendencoj en la lingvo. Evitendaj estas gramatikaĵoj kaj vortformoj, kiuj senĉese erarigas parolantojn de Esperanto sur ĉiuj niveloj de lingvoscio, senkonsidere de la gepatra lingvo de la koncernuloj. Urĝe bezonata estas didaktike uzebla gramatiko de la lingvo, kiu malkomplikos la enhavon de *Plena analiza gramatiko* (PAG). Lastatempe Akademiano Werner Bormann klar- vide esprimis la saman sintenon, pledante por la akcepto fare de esperantistoj de facileco kiel esenca kriterio de Esperanto. “Tion oni povas atingi, evitante la senpripen- san ŝarĝadon de la lingvo per reguloj kaj ŝveligon de la lek- siko per novkreado de vortoj, kiuj plidistancigas Esperan- ton de ĝia skemisma esenco en la direkto al naturalisma planlingvo.”¹⁰ Sekve, estas necese pritrakti la modifon aŭ eliminon de gramatikaĵoj kaj vortformoj, kiuj ĝis nun montriĝis senefike instrueblaj kaj malfacile lerneblaj. Jen granda tasko por esperantologoj en la dua jarcento de Esperanto.

Bernard Golden

Notoj

1. E.J.F. Kion diris sinjoro Kabe? *Literatura Mondo*, 1931; 7: 144-145. Represita: 251-257 en *Ludovikologiaj biografietoj*. Plena verkaro de Zamenhof, kromkajero 3. Ludovikito: 1987. 335p. Vd. p.254.
2. Émile Boirac. Raporto pri la konkurso. *La Revuo*, 1907 julio; 1 (11):521.
3. *Internacia Jura Revuo*, 1979; 1:34.
4. *Internacia Jura Revuo*, 1985; 2:31.
5. *Centjara Esperanto*. Fonto: 1987. 240p. Vd. p.19.
6. *Heroldo de Esperanto*, 1987; 15: (Literatura Suplemento) 1.
7. *Heroldo de Esperanto*, 1987; 8:4.
8. *Heroldo de Esperanto*, 1987; 2:4.
9. Vd. noton 1, p.254.
10. Werner Bormann. Mondlingvo longperiode. 95-107 en *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*. Universidad de La Laguna: 1987. Vd. p.103.

Reagoj

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Neforgesebla pioniro

Mi sentas bezonon — eĉ devon — danki pro la altnivela enhavo de la februara numero je la memoro de Ivo Lapenna.

Speciale min trafis la artikolo de Ulrich Lins. Kuraĝe, li nenie kaj neniel kaŝas la erarojn kiujn faris nia forpasinta pioniro. Ĝuste pro tiu prezentado de ĉiufankaj ecoj, Lins sume reliefigas la karakteron de Lapenna kiel elstara homo, kies meritoj, en perspektivo, vaste superas la mispaŝojn.

Espereble tio instigos tiujn, kiuj siatempe kun Lapenna turnis sin for de UEA, reveni al nia organizaĵo, al la konstruaĵo kreita de Hodler, Privat kaj. . . Lapenna.

Frits Zeiler (Nederlando)

Ĉar dum la lastaj 30 jaroj prof. Lapenna ĉefis kiel Honora Prezidento de Esperanto-Ligo en Israelo, mi deziras aldoni miajn memorojn el la

32a Universala Kongreso. Per sia antifaŝista rezolucio li elvokis la plej streĉan intereson de la kongresanaro. Dum la debatoj ne mankis interrompaj elkrioj, eĉ tre pasiaj, sed Lapenna respondis kviettone, dignoplene, sen signo de nerviĝo.

Tamen karakterizis lin lia ŝato pliakrigi konfliktojn. La forstrekon de unu punkteto li senkompromise rifuzis. Al mi li diris: “Kiu ne estas por, tiu estas kontraŭ!” Ĉu mi konsentis kun li, aŭ ne — tamen nur dank’ al tiaj rektkarakteraj kaj batalmaj personoj liberiĝis lia patrujo. . .

J. Cohen-Cedek (Israelo)

Mi estis ŝokita pro la aluda kredigo sur p.23, ke Lapenna estus iu (eksa?) stalinisto, kiu “kredeble pro kombinaĵo de personaj kaŭzoj kaj de malkontento pro la politika evoluo en la lando” forlasis Jugoslavi-
on. . . Dum sia tuta agado Lapenna estis gvidata de sia firma kaj sen

kompromisa sinteno por la Internacia Lingvo kaj la humanismaj idealoj ligitaj al ĝi, inkluzive de la homaj rajtoj.

En 1974 en Hamburgo li decidis, ke lia agado por la menciitaj idealoj plej bone okazu en la Esperanto-movado ekster UEA. Oni povas diskuti, ĉu tiu decido estis ĝusta aŭ ne, sed oni ne rajtas dubi, ke en plena honesteco li agis sole laŭ sia takso de la intereso de la Esperanto-movado, por kiu dum la periodo 1974-87 li laboris per la sama energio kiel antaŭe kaj certe neniel “evoluan-
te” rilate al la nomitaj fundamentaj principoj. **Sven Ziegler (Danlando)**

Red.: Mi ne komprenas, kial “personaj motivoj” estas nepre malhonorigaj (mi mem ne subkomprenis ian riproĉon en tiu frazo de Lins), kaj mi estas ĉiam iom skeptika pri agado “sole” pro principo. Estas tro simplisme, pretendi tiel klarigi malsimplan homon, ĉu ne?

Iluzio pri kio?

En la decembra numero (1987) la prezidanto de la Akademio de Esperanto reagis je mia propono pri eventuala fondo de “Internacia Konsilantaro Esperanto — Lingvo kaj Movado”. Mi tre bonvenigas reagojn pri tiu propono kaj pro tio ĝojis, ke la prezidanto de la Akademio estis la unua. Pri lia reago mi volas komenti, ĉar ŝajne estas kelkaj miskomprenoj:

1. D-ro Albault ne forigis mian pesimismen pri la efektiva funkcio kaj evoluo de la Akademio. Mi ĝojus, se li pli detale ol en n-ro 7-8/87 prezentus la nunan situacion kaj estontan laboron de nia lingva institucio.

2. Mi tre bonvenigus vere aktivan Akademion. Mi malakceptis (ne nur unufoje) afable proponitan kandidatigon i.a. pro tio, ĉar mi ne povas akcepti la nunan laborfilozofion kaj agmanieron de ĉi tiu institucio. Nur unu ekzemplo: Dum la Universalaj Kongresoj la akademianoj preferas limigi sian publikan agadon al respondado de plimalpli gravaj lingvaj demandoj anstataŭ vere dialogi kun la kongresanoj pri la rolo, funkcio kaj esperata funkciado de la Akademio. Tio ŝajne estas simptoma.

3. La de mi proponita Internacia Konsilantaro tute ne celas anstataŭigi la Akademion aŭ konkurenci al ĝi. Ĝi devus havi aliajn taskojn kaj, ekzemple, povus doni al la Akademio rekomendojn, kiujn ĝi konsiderus aŭ rifuzus. Ne estus neeble, ke tia funkciunta Konsilantaro eĉ povus

aktivigi la Akademion. Estus bele...

4. Mi tute ne celas Konsilantaron konsistantan el deeksteraj “ eminentuloj”. Mi celas kompreneble homojn, kiuj bonege konas la lingvon kaj la movadon. Tio ne malhelpus, ke ili povus bone kunlabori kun nemovadaj sciencistoj. Tiuj ja tamen ofte helpas al ni vidi pli klare problemojn kaj mankojn. Se mi bone komprenas, la Akademio tute ne havas iun ajn kontakton kun neesperantistaj lingvistoj, aplikante strute la siatempe kompreneblan konsilon de Zamenhof: “Konsiliĝu neniam kun lingvistoj...” (PIV, p.641).

5. Kompreneble mi konas la historion de la “Délégation pour l’adoption d’une langue internationale” kaj “International Auxiliary Language Association”. Kial d-ro Albault ne mencias, ke la cititaj Wilhelm Ostwald, Jan Baudouin de Courtenay, Otto Jespersen kaj André Martinet faris multon por principa akceptigo de la ideo pri konscie kreita internacia lingvo (ni diru “planlingvo”)? Cetere, kun la sperto de Ido kaj de Interlingua oni hodiaŭ povas pli profunde paroli pri Esperanto...

6. Ke profesinivela kunlaboro kun neesperantistaj lingvistoj alportas bonajn rezultojn por Esperanto kaj por la lingvistoj mi jam kelkfoje montris. Do, tamen konsiliĝu kun lingvistoj!

7. Mi havas la fortan impreson, ke la Akademio restis en la etoso de la dudekaj jaroj. Kaj tio maltrankviligas ne nur min.

Detlev Blanke (Germana DR)

Laste aperis...


Almanako Lorenz 1988. Rio-de-Janeiro: Spirita eldona societo F. V. Lorenz, 1988. 144p. 21cm. Kolekto de spiritismaj tekstoj en E-o. Prezo: 9,00 gld.

Ĉiutagaj vortoj kun difinoj; aŭ Ne-necesaj neologismoj por ne-necesaj poetoj, gekielvifartasuloj kaj krokodiloj. Rikardo Ŝtalo. La aŭtoro, 1987 (loko neindikita). 30p. 21cm. Broŝ. Neologismoj, plejparte elpensitaj de la aŭtoro. Prezo: 6,60 gld.

De Josuo al Jeremia kaj De Jeĥezkel al Malafii. el la hebrea biblio trad. L.L. Zamenhof. Nagoja: Ludovikito, 1987. 487+436p. 30cm. Iam kompletigota plena verkaro de Zamenhof. Duvoluma fotorepreso de la zamenhofaj biblio-tradukoj. Prezo: po 84,00 gld.

Dio estas silento. Pierre Lacout. El la franca tradukis J. Richard Evens. Londono: Kvakera Esperantista Societo, 1987. 14p. 18cm. Broŝ. Studeto pri la rolo de silento en religia kontemplado. ISBN 0 9509347 2 0. Prezo: 3,90 gld.

Economics of language use, The. Report of the 5th annual conference of CED. Red. Humphrey Tonkin k Karen M. Johnson-Weiner. New York: CED, 1987. Mimeo. 164p. 28cm. ISBN 0 934973 06 07. Referaĵoj el la CED-konferenco 1986. Prezo: 22,50 gld.



Du nepraĵoj por kolektantoj: la iranaj Robaĵoj kaj la impona Serta de Régulo Pérez.

Jen nia mondo 2; Fortsättningskurs i esperanto. John C. Wells. Esperantoförlaget, 1988. 101p. 21cm. Svedlingva traduko de populara kurslibro. Prezo: 18,00 gld.

Karel Čapek. Unu el la reprezentantoj de la ĉeĥa literaturo kiel fenomeno universale homa. Red. Jiří Karen kun tradukoj de Josef Vondroušek. Prago: Literatura suplemento al *Paco*, 1987. 32p. 21cm. Broŝ. Antologieto de la verkaro de Čapek kun koncizaj biografiaj kaj bibliografiaj indikoj. Prezo: 3,90 gld.

Knabino kiu ne volis iri al la infanejo, La. Siw Widerberg k Cecilia Torudd. El la sveda trad. Malte Markheden. Stockholm: Progreso Eldonejo, 1988. 33p. 24cm. Bind. Ilus. ISBN 91 87320 02 9. Ĉarma rakonto pri infankonduto universale konata. Prezo: 57,00 gld.

Mil demandoj. La unua parto. Komp. Gim Terpo. Koreio, 1987 (detaloj ne indikitaj). 57p. 26cm. Mimeo. Dekkvarpaŝa E-ekzercaro en formo de didaktikaj demandoj. Prezo: 7,20 gld.

Mineralnavn: Kvarts — kvarco — quartz. Tom Arbo Hoeg. Oslo: Universitetsbiblioteket i Oslo, 1988. 264p. 25cm. Registro

de mineralogiaj terminoj en la norvega, angla kaj Esperanto, plus la kemiaj formuloj. ISBN 82 7000 142 2. Prezo: 69,00 gld.

Ný kennslubók í Esperanto. Baldur Ragnarsson. Reykjavik: Mál og mening, 1987. 115p. 29cm. Lernolibro islanda. Prezo: 57,90 gld.

Ora bukĉeno. Ŭang Ĉjiĝong. Ilus. de Ĝjang Ŭejji. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 38p. 21cm. Ilustrita bildrakonto laŭ popolfabelo. Prezo: 4,20 gld.

Rubaiyat of Omarkhayyam in 30 languages. Komp. Mohsen Ramezani. Tehran: Padideh Publishing, 1987. 709p. 25cm. Bind. Ilus. Multlingva, riĉe ilustrita eldono de la fama poeziaro de la persa poeto. Inkluzivas 210 robajojn el la traduko de Waringhien kaj antaŭparolon en Esperanto. Prezo: 198,00 gld.

Sinjoro Tadeo (1834), Adam Mickiewicz (1798-1855). El la pola trad. Antoni Grabowski (1857-1921). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1986. 334p. 20cm. Ilus. Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 22. 3-a eld. Kun antaŭparolo de Humphrey Tonkin. Renoma traduko de la granda pola epopeo, kiu forte influis la Esperantan poezion post sia apero en 1918. Longa poemo pri la lando kaj vivo de la malnova pola-litova nobelaro. Prezo: 24,00 gld.

Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. 2: Esperantismo. Div. aŭtoroj. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. 790p. 25cm. Bind. ISBN 84 600 4292 8. Sesdeko da esperantologiaj eseoj pri plej diversaj temoj, el la plumo de monde konataj aktivuloj sur tiu kampo. Prezo: 120,00 gld.

Tri 'stas tro, Gerrit Berveling. Vlaardingen: Vlardingenaj Kajeraj (2), 1987. 44p. 21cm. Ilus. Originala modernstila poemciklo pri la celoj de la vivo. Prezo: 6,00 gld.

Unuaj libroj por esperantistoj, L.L. Zamenhof (1859-1917), red. Ludovikito (Itô Kanzi, 1918-). Nagoja: Nagoja Esperanto-Centro, 1987. 160p. 21cm. Bind. 2a eld. reviziita (1-a eld. 1973). Represo de la Unua Libro por rusoj kaj la Dua Libro plus la Aldono; postparolo kaj indekso. Prezo: 39,00 gld.

Vagante tra la mondo maltrankvila, Nadija Hordijenko-Andrianova. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 102p. 20cm. ISBN 963-571-182-4. Originala poemaro homaraisma, inspirita de peresperantaj travivaĵoj. Prezo: 13,80 gld.

Vestokulturo, Ante Vladislavić. El la kroatserba trad. Lucija Borčić. Osijek: Revija, 1987. 48p. 24×20cm. Bind. Ilus. ISBN 86-7209-003-9. Riĉe ilustrita superrigardo, kiu konsciigos precipe infanojn pri la temo. Prezo: 19,80 gld.

Via lando, mia lando, kompilis kaj eldonis Kobe-Esperanto-Societo, 1987. 110p. 21cm. Ilus. Esploro pri vivkutimoj inter diverslandaj esperantistoj. Dulingva eldono. Prezo: 26,40 gld.

Vojaĝo al Hiroŝima, tradukis kaj eldonis Hiroŝima Esperanto-Centro, 1987. 60p. 26cm. Ilus. Porpaca gvidlibro pri la japana urbo, super kiu eksplodis la unua atombombo. Prezo: 6,00 gld.

Vole... Novele (1971), Raymond Schwartz (1894-1973). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987 (2a eld.). 192p. 21cm. Jubilea Eldon-Serio 1. Beletro 10. Pli ol trideko da noveloj el la jaroj 1920-1970, montrantaj la spriton kaj viglan stilon de talenta humoristo. Prezo: 30,00 gld.

Zamenhofa ekzemplaro, red. Rihej Nomura. Nagoja: Nagoja Esperanto-Centro, 1987. 568p. 21cm. Bind. Kolosa konkordanco de esprimoj uzitaj de Zamenhof, kvazaŭ kompletigo de la ekzemploj en *Plena ilustrita vortaro*. Prezo: 75,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Albanio:** Post jardekoj da suspekto aŭ persekuto kontraŭ esperantistoj, komenciĝas malglaciigo en ĉi tiu malgranda balkana lando. Unu el la konataj albanaj leksikologoj nun faradas prelegojn pri E-o okaze de la jubileo. En la printempo komenciĝos kompilo de albana-Esperanta vortareto sub la supervido de Marcel Cortiade, esperantisto, oficisto de la franca ambasedejo en Tirano.

● **Aŭstralio:** Dum oktobro kaj novembro miloj da vizitantoj vizitis ekspozicion "100 jaroj de Esperantaj eldonaĵoj" en la aŭstralia nacia biblioteko.

● **Aŭstrio:** La prezidanto de la Pola Parlamento, marŝalo Roman Malinowski, dum sia ŝtata vizito al Aŭstrio en decembro 1987 ne nur renkontis la ĉefkancelieron kaj la prezidanton de la Respubliko Aŭstrio, sed malgraŭ streĉita plano rezervis tutan horon por vizito al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

● **Latinameriko:** En oktobro 1987 aperis la unua numero de nova internacia revuo, Latinamerika memuar. Ĝia devizo "Por esperantigi nian kulturon kaj kulturigi nian Esperanton" nur parte respegulas ĝian politikeman — progreseman emfazon. La eldonantoj, Latinamerika Peresperanta Kulturcentro (LAPEK), skizis ambician programon de tradukado, artikolado ktp, en kaj inter Esperanto kaj la hispana. Kontakto ilin ĉe Apartado Aereo 528, Armenia (Q), Kolombio.

● **Nov-Zelando:** De la 12-a ĝis 16-a de januaro en Auckland okazis la 53-a nov-zelanda kongreso, kiun partoprenis ĉ. 50 personoj. Dum la kongreso elektiĝis nova estraro de Nov-zelanda Esperanto-Asocio, kun Paul Friedman kiel prezidanto kaj Jo Knight kiel ĝenerala sekretario.

● **Pakistano:** La 14-an de januaro fondiĝis klubo en Jhelum sub la gvido de Saeed Ahmad Farani. Oni intencas organizi kurson, aperi bultenon,

malfermi E-fakon en urba biblioteko kaj regule kunvenadi. Kontakt-adresoj: H.No. K-118, M.M.No. 3, Jhelum, Pakistano kaj S.A. Farani, P.k. 2056, Islamabado (ankaŭ informoj pri la 10-a landa kongreso).

La perslingva libro de d-ro Saheb-Zamani, *Kulturo kaj lingva revolucio*, estas tradukita en la urduan lingvon fare de prof. Mohammad Suleman. Ĝi baldaŭ eldoniĝos ĉe E-centro en Jhelum.

● **Pollando:** En februaro s-ino Kimie Markarian, japanino nun loĝanta en Britio, faris esperantlingvan prelegvojaĝon pri sorobano (japana arto pri paperfaldado) tra Pollando. La vojaĝon plene subvenciis Ligo de Persorbana Edukado en Japanio (ne-esperantista organizo).

La 22-an de januaro okazis en Jelenia Góra publika renkonto kun la fama pola poeto kaj dramisto Tadeusz Rożewicz, okaze de la apero en Esperanto de lia *Formoj de vizaĝo*. Tiu ĉi estis lia unua publika prezentiĝo post 10-jara rifuzo esti intervjuata kaj partopreni publikajn renkontojn.


● **Soveta Unio:** Komence de la pasinta jaro en la sidejo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj en Moskvo estis registritaj ĉ. 200 Esperanto-kluboj tra la lando. ASE mem konsciis, ke tiu nombro ne estas kompleta kaj iniciatis enketon pri eventualaj pliaj grupoj kaj kluboj ankoraŭ nkonataj al ĝi.

En decembro 1987 aperis tre pozitiva intervjuo pri Esperanto en *Sputnik*, vaste legata resumrevuo de la sovetiaj komunikiloj. Dimitri Perevalov, gvidanto de la sovetia MEM-sekcio, sukcesis en malmultaj vortoj doni interesan kaj seriozan bildon pri la movado.

● **Svedio/Tanzanio:** Tanzania esperantisto Nzaniye Bernard faris dum pasinta septembro prelegvojaĝon tra esperantistaj kluboj en Svedio, parolante pri la movada vivo en Tanzanio. La svedaj esperantistoj respondis per diversforma subteno por la tanzanianoj; jam okazis unu ĝemeligo de E-kluboj en la du landoj kaj oni esperas pri ankoraŭ unu. Adreso por alilandaj interesatoj: Nzaniye B., Anita Lindblom, Märhamngatan 18, S-163 27 Spånga, Svedio.



● **Jugoslavio:** Minimume 5 milionoj da jugoslavoj spektis televidan kvizelsendon la 11-an de decembro 1987, dediĉitan preskaŭ entute al Esperanto. Tiu estis nur unu ero en informa inundego dum la lasta jaro, kiu ampleksis pli ol 150 artikolojn, 200 radio-elsendojn kaj 15 televidajn prezentojn. Du jugoslaviaj grandaj ĵurnaloj publikigis felietonojn pri Esperanto: *Večernji list* de Zagreb, la plej granda laŭ eldonkvanto en la lando, publikigis felietonon de Spomenka Štimec kaj *Oslobodenje* de Sarajevo felietonon de Smail Grbo. La bildo montras la naŭ eldonojn de tiu lasta.



● **Madagaskaro:** En Madagaskaro fondiĝis "Nacia centro por instruado de la internacia lingvo Esperanto". En ĝi laboras ok esperantistoj. Oni petas la eksterlandajn kunlaborantojn sendi donace instrumaterialojn kaj esperantaĵojn kaj utilajn sugestojn. Adreso: Centre National d'Enseignement de la Langue Internationale Espéranto (NaCILES), BP 3171, Antananarivo 101, Madagaskaro. La foto montras la enirejon de la Centro.

● **Tajlando:** Dank' al artikolo en la taja gazeto *Matiĉon*, kiun aperigis la mondvojaĝantaj esperantistoj ges-roj Robineau, Marcel Perray ricevis 60 informpetojn kaj entute dudek personoj aliĝis al koresponda kurso.

● **Usono:** De la 25-a ĝis 27-a de marto okazis en Sacramento Tutkalifornia Esperanto-Konferenco kun la temo "Esperanto kiel pontlingvo en edukado". La teman sektion de la programo aŭspiciis la Ŝtata Departemento pri Edukado de Kalifornio, kiu konsideras la eblan enkondukon de Esperanto kiel nedeviga fremda lingvo.

● **Zairio:** La jenaj novaj delegitoj, junularaj delegitoj kaj fakdelegitoj de UEA malfruis por eniri la ĉi-jaran Jarlibron, kiu aperos komence de majo: (D) Vumi Nsita, maŝinisto; (JD) Nkunku Niansi, studento; (FD transporto) Mayombe Nzilamosi, ŝoforo; (FD sukerfabrikado, kristanismo) Nsuka Matezo, magazenisto; (FD asekuro, sporto) Watumbua-kua Ngonde Nkodia, asekuristo. Ĉiuj kontakteblas ĉe sia klubo: "La verda stelo", B.P. 2, Kuilu Ngongo (Bas-Zaïre), Zairio.

Fake

● **Bahaismo:** De la 19-a ĝis la 22-a de februaro okazis la unua Eŭropa bahaa renkontiĝo en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

● **Bibliotekoj:** Aperis nova katalogo de la privata E-biblioteko "Ramón Molera Pedrals" en Moia, Hispanio. Ĝia kolekto konsistas el 1320 malsamaj titoloj de gazetoj, bultenoj, informiloj k.s. el la periodo 1887-1986, kun entute pli ol 6500 jarkolektoj.

● **Blinduloj:** La angla nacia biblioteko por blinduloj (National Library for the Blind, Cromwell Road, Bredbury Stockport SK6 2SG, Anglio) eldonis 25-paĝan katalogon de brajlaj libroj en E-o.

● **Ekologio:** La ekologia sekcio de ASE proponas ĉiujare organizi "Internacian ekologian manifestaĵon de volontula laboro" kun la celo engaĝiĝi pri laboroj por naturprotekto: "verda ondo" laŭ la principoj de la pasintjara "paca ondo" (ASE, SU-103885 Moskvo, K-9, prosp. Kalinina 14).

● **Filmarto:** Eldonisto Dušan Adnadj prilaboras leksikonon pri la filmarto, kaj invitas ĉiujn nunajn kaj iamajn kolektantojn de aktoraj fotoj k.s. sendi duoblaĵojn aŭ proponi interŝanĝon. Skribu al la adreso de IAHE (sube), kiun helpi la projekto celas.

● **Handikapuloj:** Pro internaj organizaj problemoj la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj (IAHE) ĉesigas sian aktivadon ekde la komenco de 1988. La sekretario tamen daŭre bonvenigas informojn kaj materialojn por la kazo de posta reaktiviĝo: Ŝkolska 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

● **Parolsintezo:** Komputila programaro por parolsintezo de Esperanto, elaborita fare de Ilona Koutny, Gábor Olasz kaj László Czapp de la budapeŝta universitato, estas aĉetebla kontraŭ 350 GM. La variaĵo por PC-komputiloj estas nun preparata kaj kostos ĉ. 550 GM. (Ilona Koutny, Teknika Universitato de Budapeŝto, Stoczek u. 2, H-1111 Budapest)

● **Radio:** La Estona Radio ŝanĝis la ondolongon kaj tempon de siaj elsendoj en E-o. Nun ili okazas ĉiun unuan kaj trian ĵaŭdon de la monato je ondolongoj 290m/1035kHz kaj 50,6m/5925kHz je 21h25 laŭ Universal Tempo. La ripetoj okazas dimanĉe samsemajne je 9h20 laŭ UT. Elsendodaŭro 10 minutoj. En la landoj de mezeŭropa tempo necesas aldoni al UT vintre unu kaj somere du horojn. Rimarkoj pri la aŭdebleco kaj enhavo bonvenaj (Esperanto, Estona Radio, Tallinn, SU-200100 Sovetunio).

Loka stacio en Rejkjaviko, aŭdebla en preskaŭ tuta Islando, elsendas ĉiusemajne 1,5-horan programon pri kaj en Esperanto, inkluzive de kurso.

Persone

● **Bácskai:** La 10-an de februaro fariĝis okdekjara d-ro István Bácskai, emerita ĉefkonsilisto de la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj, iama komitatano de UEA kaj nun honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Bácskai multe aktivis por Esperanto en fervojaj medioj kiel kursgvidanto, la fonda redaktoro de *Hungara Fervojista Mondo* kaj organizanto de la hungara sekcio de IFEF, kaj estis vicprezidanto de HEA de 1965 ĝis 1973.

● **Blanke:** La Ministro pri altlernejoj kaj faklernejoj aferoj de GDR, la 1-an de februaro 1988, nomumis d-ron Detlev Blanke "Honoraria docento" pri interlingvistiko ĉe Universitato Humboldt de Berlino, enkadre de la soci-sciencia fakultato. La docenteco ebligas certigi sisteman prelegadon kaj instruadon, stimuladon de diplomlaboraĵoj, doktorigaj disertacioj k.s. Temas pri la dua universitato en la mondo, post Universitato Eötvös Lorand en Budapeŝto, kiu enkondukis interlingvistikon en tia rango.

● **Martinet:** La monde konata franca lingvisto André Martinet donis intervjuon en sia hejmo al François Lo Jacomo kaj Detlev Blanke en novembro 1987. La duhoran intervjuon, kiu estis ĝenerale favora pri Esperanto, oni planas broŝure eldoni.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aŭstralio: S-ino G. Morgan. Ĉeĥoslovakio: P. Omarko. Finnlando: O. I. Kauppinen, O. Buller. FR Germanio: S-ino A. Donat. Japanio: T. Saitō. Svedio: S-ino U. Luin, M. Häggström. Svislando: R. McCoy.

DUMVIVA PATRONO DE TEJO

Italio: Dario Besseghini.

PATRONOJ DE TEJO 1988

Belgio: Stella De Weerd. Britio: Alec Venture. FR Germanio: Franz Knöferl, Didier Izacard. Hispanio: Enric Gimeno Palau. Honkongo: Ian Jackson. Israelo: Josef Murĵan. Italio: Ada Fighiera-Sikorska, Clara Gubbioli Carioli, Michela Lipari Sato, Sergio Martina, Vittoria Spina. Japanio: Santi Asano, Humiya Morita, Bun'iti Isizaki, Mituru Iwaya, Zyun-iti Sibayama, Kazuko Kikusima (Krizantemo), Utako Kobayasi, Hiroo Kodama, Jasuo Mori, Katuya Sumiyosi, Yosiki Tatumi. Luksemburgio: Brian R. Moon. Nederlando: Dini Kappert, F. J. Pieterse-Kruger, H. ten Hagen, J. S. Douma, J. Soeteman, Louise Adelaar, M. Meijwes, Oene Hoekstra, R. Vetter, Willem Spoelder, W. A. Massar-van Diepen, W. L. van Leeuwen. Nov-Zelando: D. J. Langman, Frank E. Swift. Svedio: Lennart Åberg. Usono: Dorothy Holland-Kaupp, Ellen Eddy, Eugene H. Thompson Jr., Gigi Harabagiu, Miguel-Angel Altuna Aspiazu, William A. Shanks.

SOCIETO ZAMENHOF 1988

Aŭstralio: Tim A. Einihovici, L. V. Scott, Margaret Mary Chaldecott, Ralph Harry. Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: Eliza Kehlet, Elfriede Ernst, Jules Verstraeten, Karel Van Steenberghe, L. Dréze. Brazilo: Elvira Fontes. Britio: E. A. Fairbairn, Wilfrid G. Atkinson. Danlando: Ejnar Hansen. Finnlando: Aarne Ratalahti, Irma E. Heikkilä, Juno Pyykönen, Liisi Oterma, Osmo Buller, Sirkka Mattlin, Terttu Österman, Vuokko Tellervo Heinäsuo. FR Germanio: Harry Bily, Elisabeth Hirsch, Elfriede Kruse, Ellen Eggers, Elise J. F. Woller, Erdmann Fritsch, Martin Gründler, Helene Hiebel, Hans Schütt, Julie Winter, Helmut Klünder, Marieta Moschner, Jean Prager, Richard Hirsch, Peter Weide, Werner Heinrich, Margarete von Waldowski. Francio: Alexandre Maczkowski, Eija-Liisa Chevalier, Gaston Waringhien, Gerard Peet, Pierre Guérout, Hélène Gauducheau, Jack-André Rousseau, Jean-Paul Beau, Odette Bernet, Paul Coulot, Roger Despiney, Julien Ducrocq, Raymond Perault. Hispanio: Ricardo C.

Monterde Gomez. Honkongo: Ian Jackson. Islando: Lovisa Óskarsdóttir. Clara Gubbioli Carioli, Michele Mariano, Vittoria Spina. Japanio: Kyōhei Nakazima, Kōiti Simizu, Takeo Sugano, Toshihide Kuwahara, Toyozo Nisikawa. Jugoslavio: Jožica Židanik. Kanado: Dorothy M. Hawley, W. D. B. Hackett. Luksemburgio: Brian R. Moon, Claude Nourmont. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: Dini Kappert, Evert J. Woessink, G. F. Makkink, G. T. Knol, H. Smits, Louise Adelaar, H. C. Luijke, M. Meijwes, Truus Mantingh, Robert Moerbeek, S. A. K. van der Zee, Sija van Wijngaarden, Akiko Ŭusink-Nagata, W. A. Verloren van Themaat, Gerda H. M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Agnete Anjer, Vidar Vik. Nov-Zelando: D. J. Langman, John Charles Rapley. Svedio: Bertil Bengtsson, Gunnar Börjesson, Sten Axel Broman, Birger Viggen, Elma Adamsson, Edla Nilsson, Gunnar Gällmo, Gustav Nygård, Harald Andersson, Henrik Karlsson, Inga-Maj Lindkvist, Jim Hornö, Lennart Svensson, Ragnar Hjorth, Gunhild Tistad, Tore Johansson, Vasilka Börjesson, William Malmsten. Svislando: Margrit Guldin. Usono: Anne Whitteker, Armin F. Doneis Sr., Frederik J. Belinfante, Bruce Arne Sherwood, Alberta Seabold Casey, Cecelia Peterson, Charles W. Tustin, Eugene H. Thompson Jr., Gigi Harabagiu, Thomas A. Goldman, Thomas H. Goodman, Humphrey Tonkin, Ken Thomson, L. A. Walther, Margaret L. Barkley, Margaret Zarchy, Milton O. Brown, Pauline Ledeer, Robert A. Swenson, Ruth Culbert, William Solzbacher, Sidney S. Culbert, Douglas B. Swett, William H. Schulze, Julius Balbin.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Finnlando: Helvi Jaakkola, Liisi Oterma, Tapio Sormunen, Terttu Österman. FR Germanio: Heinrich Nischwitz, Werner Heinrich. Japanio: Nobuo Sakurai. Kanarioj: Adam Goralski, Kristina Krause de Goralski. Usono: Dorothy Holland-Kaupp, Eugene H. Thompson Jr., Thomas H. Goodman, Hiram Elwin Reed, Jack Wright, Robert A. Swenson. SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Aŭstralio: Teresa M. Metherall. Belgio: Stella De Weerd. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Finnlando: Hemmo Tietti, Veera Tietti. Meksikio: Julie L. Regal. Nov-Zelando: Jeannie Wilson. Usono: Bruce Arne Sherwood, Alberta Seabold Casey, Cleo J. Fort, James T. Lyons, José R. Vazques, Maya Kennedy, Sonoko Kuzume, Miguel-Angel Altuna Aspiazu, Pierre C. Jelenc, Prenda E. Cook, Scott S. Smith.

DONACOJ 1988 (gld.)
ĝis la 29-a de februaro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Anonima donaco 100,00. Britio: B. W. G. Phillips 40,19. Finnlando: T. Sormunen 183,00, T. Österman 156,76. Francio: M. Bodard 48,00. FR Germanio: W. Heinrich 561,60. Israelo: M. Savir 100,00. Kanado: A. Laur 13,76, B. R. Crisp 29,97. Nederlando: R. Moerbeek 250,00, M. J. D. Libourel 20,00. Svedio: Esperanto-Klubo Norrköping 96,00, W. Malmsten 105,40, H. Andersson 15,50, L. Svensson 24,80. Usono: Dorothy Holland 1187,10. Por afrika agado: Honore al O. Walder 136,35. Sumo ĉi-jara 3068,43.

FONDAĴO CANUTO: Anonima donaco 100,00. Finnlando: I. Helsingius 207,50, I. Klemola 345,84. Kanado: K. Lendon 41,29. Nederlando: M. J. D. Libourel 20,00. Svedio: T. Jansson 34,72, O. Kleborgh 31,40. Sumo ĉi-jara 780,75.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Nederlando: M. J. D. Libourel 10,00. Sumo ĉi-jara 10,00.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): FR Germanio: A. Conzeth 94,48. Sumo ĉi-jara 94,48.

ĜENERALA KASO: Britio: A. Diaz 66,45, A. W. Rowe 12,56. Finnlando: A. Ratalahti 23,06. FR Germanio: I. Pahnhenrich 26,96, A. Hartwig 12,00, R. Terjung 35,50. Jugoslavio: J. Židanik 37,00. Norvegio: J. Rømmesmo 16,54. Svislando: W. Schaufelberger 23,46, H. De Sassi 13,80. Diversaj malgrandaj 14,51. Sumo ĉi-jara 281,84.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: G. Ellerman 30,00. Sumo ĉi-jara 30,00.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Finnlando: L. Oterma 23,05. Nederlando: M. J. D. Libourel 10,00. Sumo ĉi-jara 33,05.

FONDAĴO TEJO: FR Germanio: W. Heinrich 336,96. Sumo ĉi-jara 336,96.

FONDAĴO WŬSTER: Nederlando: M. J. D. Libourel 10,00. Sumo ĉi-jara 10,00.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Nov-Zelando: J. Wilson 62,50. Sumo ĉi-jara 62,50.

ESPERANTO CENTRO BIALYSTOK: Svislando: A. Stakian 140,00, E. Viret 95,00. Sumo ĉi-jara 235,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Granda Esperanto-ekspozicio UT-INESPO (Utileco Internacia de Esperanto) okazos en Rio de Janeiro dum la semajno 26a de junio ĝis la 3a de julio. La ekspozicio havos multajn tablojn por la diversaj temoj: sciencoj, artoj, movada strukturo, religioj, sportoj, ktp. Ĉar estos malfacile havi klarigantojn dum la tuta semajno ĉe ĉiu tablo, oni metos sur la tablojn malgrandajn presitajn foliojn klarigantajn la utilecon de Esperanto por la specialaj temoj. Se vi estas skribinta aŭ povus skribi pri la utileco de Esperanto por via propra fako, sendu vian artikolon al Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, Poŝtkesto 840, CEP: 20001, Rio de Janeiro, RJ, Brazilo. Ĝi tradukiĝos en la portugalan kaj fariĝos parto de la ekspozicio, kiu eventuale iros al aliaj brazilaj urboj kaj sudamerikaj landoj.

Aŭskultu la kantokasedon *Dinjeŝ: Al venko!* Profesia kantisto, trafaj tekstoj. Studie registrita, bonkvalita eldonaĵo. Kontaktu vian libroservon!

Grupo Kvin adresŝanĝo: Ĉiujn men-dojn por eldonaĵoj de Grupo Kvin nun pritraktas Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, Britio W11 4UF (Telefono +441 727 7821).

Anoncetoj

Adresŝanĝo: Mia filino, Sara Su Jones, dum la lerneja jaro (sept.-junio) estas ĉe: Box 547, Phillips Academy, Andover, Mass. 01810, Usono. Nia nova familia adreso estas: 5048 N. Marine Dr., Apt. D-6, Chicago, IL 60640, Usono. R. Kent Jones


Gastema juna paro serĉas amikojn tutmonde. Marina k Sergej Demianov, Ibrahimova 55-16, SU-420044, Kazano, Sovetunio.

Dudekjaraga zairiano deziras korespondi tutmonde pri komputiko kaj aliaj temoj. Nsoko-Tukifimpa-Nkwangi, c/o Nsimba-Nsoko, Dpt. Technique Unibra, Sce Garage, B.P. 7600, Kin-Kingabwa, Zairio.

Entuziasma nova lernanto serĉas korespondantojn. Diomedes Rodrigues Leite, Rua Portugal 236, Piquete, Est. São Paulo, Brazilo, CEP 12620.

Esperantista familio serĉas gekorespondantojn. S-ro *Lungikisa Bondo* korespondas pri elektroniko kaj sporto. S-ro *Lungikisa Sumbu* pri instruado kaj pedagogio. S-roj *Lungikisa Bundi* kaj *Kiese Lukinda* pri ekonomio, financoj kaj diversa legado. F-ino *Lungikisa Kavovi* pri virinaj aferoj. Adreso: B.P. 1007, Kinshasa/Limete, Zairio.

17-jara soveta junulo, ŝatanto de metalmuziko kaj surrealistaj pentristoj, volas korespondi kun gesamaĝuloj. Goniónskij Iljá, SU-620097 Sverdlovsk, ul. Kosareva 9.15, kv. 116, Sovetunio.



La plej junajn
esperantistojn
celas

**VENIS
VESPERO**

nova infanlibro planita por denaska instruado de Esperanto, kun aparta enkonduko pri dulingva edukado de infanoj. Tradukita de Amri Wandel, laŭ H.C. Andersen. Havebla ĉe la libroservo de UEA (ĉ. 6 gld.) kaj ĉe ELNA. (\$3)

Fokuso 64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

SENPAĜA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

Nova komputika fakverko en Esperanto!

Ĉiu interesato povas ricevi fotokopion de manuskripto preskaŭ 600-paĝa pri la algoritma lingvo LISP. La kostoj de la fotokopiado estas 30,00 DM; al ĉi tiu sumo aldoniĝas la sendokostoj. Interesatoj bonvolu turni sin al: Boris Gärtner, Schöttlstr. 12, D-8000 München 70, FR Germanio.

Konkurso de *Kontakto*: Verku en facila lingvo!

Dum la tuta jaro 1988 okazas konkurso pri verkado en facila lingvo. Verku unu aŭ plurajn facillingvajn artikolojn. Vi rajtas uzi nur la vortojn en la listo en *Kontakto* (1988:1), kopion de kiu vi povas ricevi de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Vi tamen rajtas uzi kelkajn vortojn, kiuj ne aperas en la listo, se vi klarigas ilin en aŭ sub la teksto. La lingvaĵo de via artikolo devas esti korekta. Ni disdonos premiojn de 100, 50, kaj 25 nederlandaj guldenoj. Krome, kelkaj partoprenantoj havos la ĝojon vidi siajn artikolojn en *Kontakto*. Sendu vian artikolon antaŭ la 10-a de oktobro al Leif Nordenstorm, Lilla Nygatan 3B, 961 32 Boden, Svedio.

La junulara revuo *Kontakto* aboneblas ĉe la libroservo de UEA.

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

PLURILINGUISME ET COMMUNICATION

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

Piaf kantas en Esperanto!

Ŝi furoris en Pekino kaj ravis en Varsovio. Nun vi povas ĝui la artismon de Joëlle Rabu sur 60-minuta sondisko aŭ kasedo. "Passport" inkluzivas kantojn en la angla, franca kaj Esperanto, kun plenaj tekstoj.

Passport
Joëlle Rabu

Ankoraŭ haveblas (6"-disko):

Omaĝo al Veselin Damjanov

Mendu de la Libroservo de UEA. Passport (kasedo aŭ disko): 31,20 gld.; Omaĝo: 6,00 gld. 1/6-a rabato por minimume 3 ekz.

STUDOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO Etudes sur la langue internationale Studies on international Language

Gent
AIMAV
1987

Michel Duc Goninaz (ed.)

Université de Provence à
Aix-en-Provence
En collaboration avec
la Universala Esperanto-Asocio

J. Leyk, La Esperanta socio fronte al la ekstera medio; U. Lins, Marxismus und internationale Sprache; D.L. Gold, N.Z. Maimon's La kaŝita vivo de Zamenhof; R.E. Wood, The Development of Standard Phonology in Esperanto; P. Janton, Latentaj strukturaj trajtoj de la Esperanta gramatiko; R. Rokicki, Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron; I. Szerdahelyi, Principoj de Esperanta etimologio; M. Duc Goninaz, Problemes sémantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto; C. Piron, Créativité et expression linguistique.

Mendu de la Libroservo de UEA: 39,00 gld. plus sendokostoj, 1/3-rabato por minimume 3 ekz.

ABONU "TEJO-TUTMONDE"

Oficiala gazeto de TEJO

informas - anoncas
raportas - rakontas
opinias - kritikas
kuraĝas - kuraĝigas
instigas - edukas

**77 evoluis al unu el
la plej bonaj gazetoj
en esperantio. Abonu, do,
por 15 nederlandaj guldenoj
al la Centra Oficejo de UEA.**

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

Kultura Esperanto-Domo Grésillon F-49150 Baugé

Cseh-Seminario "A", 2-16 de julio 1988 • La Internacia Esperanto-Instituto, pro kreskanta intereso pri la Cseh-metoda instruado, organizas tri-gradajn Cseh-seminariojn. En julio 1988 okazos Seminario "A" en Grésillon por ĉiu kiu interesiĝas pri la metodo. La necesa materialo estas havebla surloke, aŭ antaŭmendebla ĉe Grésillon aŭ ĉe Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstr. 172, 2285 H W Den Haag, Nederlando.

La Oficiala Antaŭ-Kongreso

okazos en Epen, Sud-Nederlando,
de la 16a ĝis la 23a de julio 1988.

La vilaĝo Epen troviĝas en la centro de okcidenta Eŭropo. Vi imagas Nederlandon plata? Vi eraras! Venu al la sudo dum la antaŭ-kongreso kaj konvinku vin mem. Ĝuu la montetojn, dolĉajn valojn kaj pitoreskajn domojn tie. Ni preparis pakedon, kiu enhavas 56-paĝan libreton (en 5 koloroj) pri Nederlando, belan broŝuron pri la kongresa regiono ktp. Sendu 6 respondkuponojn al ni, kaj vi ricevos la pakedon. Se vi partoprenos la antaŭ-kongreson ni redonos tiun monsumon al vi.

Petu informojn ĉe UEA, Roterdamo aŭ ĉe s-ino E. Kervers, Tienbundersweg 33, NL-6321 CR Wijlre.

